

La Brila Esperantistino

Numero 996
Somero 2024



MARJORIE JUBILEE

3 • Redaktore

Tim Owen

6 • Montevideo: la aristokato

Marjorie Boulton

10 • Traduku!

Simon Davies pri La dudek-unua de Oktobro

18 • La vivo antaŭ Somerville

Marjorie Boulton en traduko de Brian Moon

23 • Marjorie celebrata

Ceremonio ĉe Somerville

26 • Omaĝe en Oksfordo

Pri la Brita Kongreso

28 • Emblemo de la 104-a Brita

Kongreso de Esperanto

30 • Improvize inkluzive

Manuela Burghilea

32 • Klarigas kombiloj

John Greenwood pri instruista trejnado

36 • Diamantas la genioj

Nicolino Rossi recenzas Rimleteroĵ

40 • Rimportretitoj

Tim Owen pri Rimportretoj de Kolomano Kalocsay

44 • Kongresa kvizo 2024

48 • Harmonio kiu savos la mondon

Nicola Ruggiero recenzas Unu animo homa

54 • Anagramoj

Jack Warren

55 • «Part of her College's History»

Jackie Watson

redaktis: **Tim Owen**

tim.owen@esperanto.org.uk

eldonis: **Esperanto-Asocio de Britio**, 483 Green Lanes, London, N13 4BS

eab@esperanto.org.uk

telefone: +44 (0)7546 590 651

retejo: **esperanto.org.uk/lbe**

enpaĝigis: Tim Owen

limdato por la sekva numero:

30 oktobro 2024

ISSN 0007-067X

provlegis: Edmund Grimley Evans

La Brita Esperantisto kaj Update estas eldonataj entute ses fojojn jare.

Artikoloj esprimas nur la opinion de sia aŭtoro kaj ne nepre ian oficialan starpunkton de EAB.

Bonvolu kontakti la redaktoron antaŭ ol verki kontribuojn por interkonsenti pri eventuala intereso, vortlimo, ktp.

ĈION DIRAS la titolo kaj kovrililo: la plej populara el la brita esperantistaro naskiĝis antaŭ cent jaroj. EAB faras multon ĉi-jare por omaĝi al Marjorie Boulton; tiu ĉi numero de *LBE* estas plia tiaĵo.

Nia brila esperantistino estis senkompare bonega ambasadoro por Esperanto, kaj unu el ĝiaj plej grandiozaj verkistoj. Ŝi estis fekundege aktiva, precipe en la jardeko post sia esperantistiĝo, kaj en 2008 oni kandidatis sin por la Premio Nobel pri Literaturo pro ŝiaj verkoj en Esperanto.

Ŝi naskiĝis la 7-an de majo 1924 en Teddington, sud-okcidenta Londono, solinfano de Evelyn (fraŭline: Cartlidge) kaj Harry Boulton. Ŝia patro fariĝis la lernejestro de la gimnazio en Barton-upon-Humber, kie edukiĝis la filino, jam flue legkapabla trijaraĝe. Pri ŝia vivo antaŭ la student-jaroj eblas legi en tiu ĉi numero, en artikolo verkita de Marjorie por *Somerville Magazine*, kiun tradukis Brian Moon. Poste vi komprenos, kial mi sentis urĝon okazigi la Britan Kongreson ĉe Kolegio Somerville, al kiu Marjorie estis alvokita por intervjuo en 1941. Ŝi ricevis unuaklasan licencion en 1944, MA en 1947, kaj BLitt en 1948.

Ŝi revenis al Somerville en 1971 por komenci doktoriĝajn studojn, kiujn ŝi finis en 1976 per disertaĵo pri Charles Reade; post tiam ŝi perlaboris sian vivon per plentempa esplorado kaj verkado, kaj restis en Oksfordo, en sia dometo en Stockwell Street, dum la restantaj kvardek jaroj.

Inter la du studperiodoj ĉe Somerville, Marjorie trejniĝis pri edukado, kaj havis plurajn postenojn, ĝis, en 1962, ŝi fariĝis direktorino de Charlotte Mason College (nun parto de la Universitato de Cumbria) en Ambleside, nord-okcidenta Anglujo, instruejo por la trejnado de instruistinoj. Ŝi verkis ses-libran serion de enkondukaj lernolibroj pri literaturo en la angla, komencante per *The Anatomy of Poetry* en 1953, kiam ŝi estis lekciistino ĉe la Kolegio de Hejmaj Sciencoj en Hexham, Northumberland. Tiuj libroj plu troviĝas en universitataj legolistoj.

Ŝlosila jaro en ŝia vivo estis 1949, en kiu okazis du notindaĵoj. La unua estas, ke Marjorie eldonis sian unuan volumon de poezio en la angla, *Preliminaries*. Ĝi ne aparte plaĉis al ŝi; aliaj homoj jam diris ĉion, kion ŝi volis diri en la angla. En tiu sama jaro ŝi malkovris Esperanton, kaj, homo sentema pri homeco, estis al ĝi allogita.

Iam poste ŝi prunteprenis ekzempleron de *Streĉita kordo* de Kolomano Kalocsay. Trafis la sago: ŝi sciis, ke tiu ĉi estas lingvo, en kiu ŝi povos ĉion esprimi. La konstato lanĉis eksplodon de poezio!

Ŝia unua poemo estis *Marborda ŝtono*, kiu publikiĝis en *Esperanto en Skotlando* en 1952. La redaktoron, William Auld, ĝi tiel forte impresis, ke li kontaktis ŝin petante legi la ne-ekzistantajn antaŭajn verkojn! Sekvis tion en 1953 *Nuntempa Eposo*, kvankam tio ne estis publikigita ĝis 2022: ĝia inspiro estis la trasuferoj de

Vlasta Uršić, kara amikino de Marjorie, kiu petegis ŝin ne eldoni la poemon. Marjorie kondukis dece, notante, ke oferi «mian plej bonan fruan verkon» ne estis sendolore.

En 1954 ŝi verkis (tamen ne publikigis) *La sekreta psiko*, erotikan sonetaron. Pirate ĝi eldoniĝis en la 80-aj jaroj. Estis ĝenerale supozate, ke verkis ĝin Marjorie, tamen tion ŝi neniam konfesis. Oni nun scias, ke ĝin naskis ĝuste Marjorie: Edmund Grimley Evans okupiĝis pri ŝia postlasaĵo, kaj vidis, ke en taglibro post estigo de la pirata versio ŝi skribis, ke honton proe ŝi ne sentas.

Ŝi fariĝis konata al la internacia esperantistaro en 1955 per la enmondigo de *Kontralte*. Tion sekvis *Cent ĝojkantoj* (1957) kaj *Eroj* (1959). En tiu fekundega unua jardeko Marjorie laboris konstante, verkante proksimume unu poemon en ĉiu tria tago. Ŝi estis tre sukcesa nova alveninto al la Belartaj Konkursoj de UEA: duan premion kaj meritan mencion ŝi ricevis en 1952; tri premiojn en 1953 kaj du en 1954, kaj pliajn tri – inkluzive de du unualokajn – en 1955. Entute ŝi rikoltis 18 premiojn en tiu ĉi unua jardeko. Ne eblas, do, nei ŝian verk-kapablon, kvankam ŝi pensis pri tio alie: la poemoj jam estis en ŝi, kaj necesis simple liberigi ilin.

Tamen ne nur poeto ŝi estas, kaj nur unu plian kolekton ŝi eldonis poste: necesis atendi ĝis 1985, kiam ŝi verkis, kun Paul Thorsen, *Du el*. Multajn ali-specajn literaturaĵojn ŝi kreis: tre fame sian biografion pri la iniciatinto de nia lingvo, *Zamenhof, Creator of Esperanto* (1960 en la angla; 1962 en Esperanto),

teatraĵojn (*Virino ĉe la landlimo* (1959), *Nia sango* (1970), *Ni aktoras* (1971)), novelojn (*Okuloj* (1967)), lernolibron (*Faktoj kaj fantazioj* (1984)), eseojn (*Ne nur leteroj de plumamikoj* (1984)). Ŝi estis ankaŭ elstara tradukisto: en ŝia postlasaĵo troviĝis nefinitaj tradukoj de *Perlo* (poemo verkita en dialekto de la mezangla, kaj kiun ŝi konsideris netradukebla) kaj *Koriolano*. Per helpo de aliaj renomuloj, tiuj du majstroverkoj publikiĝis post ŝia morto en 2017.

Marjorie estis ankaŭ longdaŭra kontribuanto en diversaj postenoj. Naskis kaj dum jaroj administris ŝi (tiam «sinjorino Boulton») la aranĝon *Somerlernejo*, okazigitan ĉiun someron en Barlaston. Kaj en 1967 ŝi alektiĝis en la rangojn de la Akademio de Esperanto, en kies sino ŝi restis dum duonjarcento, ĝis sia morto.

«Sinjorino Boulton» kaj eĉ «Marjorie Boulton» ŝi ne restis; oni parolis simple pri «Marjorie». Malgraŭ ŝiaj tre altaj kapabloj kaj atingoj, ŝi restis modesta, amikema, esence homeca. Ne siajn poemojn aŭ aliajn verkojn ŝi konsideris sia plej valora kontribuo al Esperanto, sed siajn jardekojn da korespondado kun esperantistoj ĉirkaŭ la tuta mondo, opiniante, ke per tio ŝi povos oferti al homoj malpli bonŝancaj ol ŝi ion pozitivan. Ankaŭ mi estas ricevinto de tia bonkor-eco, kiam mi fariĝis, pro «preskaŭ certe tragiko», sekretario de EAB. Marjorie dankesprime skribis al mi, tiam junulo apenaŭ konata, ke mi meritas medalon. Kaj do mi reciprokas, tajpante, kion mi diris al ŝi private je la 90-a naskiĝtagfesto: «Marjorie: via est[i]s vivo vere vivinda.»



Do, kion vi trovos en tiu ĉi festa numero? Multege da Marjorie, certe!

Krom la titolŝanĝo kaj la kovrilo – kiu, mi malmodeste agnoskas, treege plaĉas al mi, pensigante pri la kongres-emblemo kaj artfajraĵoj okaze de la centjariĝo – mi faris kelkajn redaktorajn decidojn laŭ la persona kaprico. Mi elektis komenci per mia plej ŝatata ekzemplo de ŝia verkado, la unua ĉapitro de libreto, kiun ŝi verkis en 1962, kaj kiu en eĉ la unua linio montras ŝian spritecon (kontrolu!), kiel ankaŭ faras la titolo. Nu, jes, «dekdu piedetoj» estas maniero aludi al la tri temkatoj, sed ĝi krome estas kalemburo: en 1934 Literatura Mondo eldonis poemkolekton *Dekdu Poetoj*. Lertege!

Poste estos la jam menciita artikolo pri ŝia junaĝo, la epoko antaŭ Esperanto, plus detaloj pri ceremonio okazigita en tiu tago, en kiu ŝi centjariĝus. Kaj poste venas ne unu, sed *du* recenzoj pri ŝiaj majstroverkoj, el la plumoj de du elstaraj italaj literaturistoj. La unua, verkita de Nicolino Rossi, pritraktas *Rimletero*j, kompilaĵon de 84 leteroj sprite interŝanĝitaj rondelforme inter Marjorie kaj Vilĉjo Auld dum iliaj fruaj tagoj en Esperantujo. Ni reldonis ĝin ĉi-jare, kaj duan version – plilongigitan kaj tre luksan – disdonis al kongresanoj en Oksfordo.

La duan recenzon, pri la plena poezia verkaro de Marjorie, *Unu animo homa*, verkis la talentoriĉa Nicola Ruggiero. Jen tia artikolo, kian oni kutime trovas en publikaĵoj tre kleraj.

Kleriga estos, mi esperas, eseeto, kiun mi verkis pri rilata temo: ne Marjorie kaj Vilĉjo enkondukis rondelojn en nian literaturon, sed Kolomano Kalocsay, kies *Streĉita Kordo* kaptis Marjorie por Esperantujo. Mi ofte rimarkas, ke esperantistoj scias malmulton pri la flankoj kultura kaj historia de nia afero. Nu, tio ne estas mortpuninda peko, sed mi sentas iom da respondeco prezenti almenaŭ de tempo al tempo ion pri nia pasinteco: vi do renkontos kelkajn el niaj steluloj de la antaŭjarcenta Esperantujo per artikolo pri *Rimportretoj*, inspirfonto de la postaj *Rimletero*j.



Tiu ĉi numero estas 56-paĝa, 16 paĝojn pli longa ol reklamate. Tio ne plaĉos al almenaŭ unu homo, kiu skribis leteron al mi por plendi, ke *LBE* estas tro longa, kaj ke multaj artikoloj troviĝu ne en ĝi, sed en gazeto de alia asocio ... kiun ne mi redaktas! (Tiu homo lastan jaron same nepetite sendis al mi retroŝtaĵon por plendi pri mia redaktado de *Update*: ankaŭ en ĝi, laŭ la plendo, troviĝis artikolo, kiu aperu ne tie, sed en eksterlanda revuo.)

Do, jen defio por mia pika kritikanto: kandidatiĝu por la redaktora seĝo. Mi staras preta doni al vi du jarojn por kundudri kaj enpaĝig(ig)i vian provnumeron plaĉe mallongan kaj kontentige senfatarasan, kaj do multe pli bonan ol numeroj de mi redaktitaj. Se la tiama estraro taksos ĝin sufiĉe bona por eldonado, transprenos la stirilon vi, kaj gaje gajnos tempon por plenumi flankenŝovitajn pro tempomanko projektojn mi. ■

Dum pli ol tridek jaroj Marjorie Boulton estis la prezidanto de Rondo Kato / Esperantista Kat-Amikaro. En 1964 ŝi memeldonis libreton pri sia vivo kun tri el ili, *Dekdu Piedetoj*. Jen ni prezentas la unuan ĉapitron, en kiu tuj atesteblas la spriteco de ĝia karmemora verkinto.

MIN HAVAS KATO. Tiu ĉi ne estas grama-tika eraro.

Mia kato estas aŭtokato kaj aristokato. Tiuj ĉi ne estas eraroj de ortografio.

Ne estas mirinde, ke inter miaj poemoj kelkfoje troviĝas katastrofo; ke, sen fakaj studoj pri klasifikado, mi havas profundajn sciojn pri katalogado; aŭ ke, nescia pri fiziko, mi kapablus krei, eble jam iasence kreis, katodon. Tiuj ĉi ne estas eraroj de semantiko.

Dum iom pli ol ses jaroj, tiu kato vivadis absolutisme. Tiu bela vivo ne estis laŭ la stilo de dudek-jarcenta diktatoro, inter telefonoj, aviadiloj, revolveroj, burokratoj en nigraj kostumoj. Ĝi pli similis al la vivo de iu despoto eble el biblia epoko: despotismo de bankedoj, parfumoj,

kusenoj, divanoj; de luksaj kolorplenaj ceremonioj; kaj de multaj adorantaj virinoj, inter kiuj la Miaŭa Moŝto povis senti sin la sola, la unika, la nepre obeenda, la centro de la kosmo.

Vidinte kelkajn siamajn katojn kaj iom leginte pri tiu aparte bela, inteligenta kaj individueca katospeco, mi dum multaj jaroj deziris akiri siaman katon. La 18-an de februaro, 1956, siama katido akiris min kiel servantinon. Tiu besteto eĉ iom famiĝis en Esperantujo; ĝia portreto aperis en pluraj gazetoj; en kongresoj, tiuj, kiuj ĝentile demandis, kiel mi fartas, ofte demandis ankaŭ pri mia kato. Ĝi ricevis leterojn de admirantoj, salutojn, donacetojn, poemetojn. La klera fripono Baupierre aludis ĝin kalumnie en *Specimene*; Raymond Schwartz sendis al mi trezoron, malnovan reklamkarton de la «Verda Kato», «por ke vi ĉiam havu dukatojn», plant-patologo Paul Neergaard skribis sian unuan leteron al domaĝbesto.

◀ Aŭtokato kaj aŭtorino



Decis al tia kato aristokrata nomo: Lia Miaŭa Moŝto, Emfrid Don Juan Tibor Reto Julio Kolomano Ferenc de Montevideo. Tiu ĉi estas nomo por formalaj okazoj. Ordinare, oni nomas la siaman despoton simple Montevideo, iom ofende al la logiko de la geografio; geamikoj rajtas nomi ĝin Monte. Kiam ĝi ŝiras fadenojn el mia sofo, kreas ŝtuparetojn en miaj ŝtrumpoj, metas brunan veluran nazeton en la kremujon aŭ lasas blankajn harojn sur nigra jupo, mi kelkfoje nomas ĝin per kelkaj aliaj ne-oficialaj nomoj.

Tiu kato ĝuis privilegiojn eblajn nur al absolutismo. Kiel eta katido, ĝi mordetis fingron de Ivo Lapenna. Iom pli aĝa, ĝi ŝtelis viandon el la telero de Tibor Sekelj, kiu komentis, ke eĉ kanibaloj en la brazila praarbaro ne faris tion. Dum horoj ĝi dormis apud la koro de Julio Baghy, kiun, per ia instinkta aŭ intuicia saĝo de besto, ĝi tuj kaj fervore ekamis.

La najbaroj en la flankstrateto kie mi loĝas en Stoke-on-Trent, ne malproksime de *Esperanto Way*, emas iomete observi mian hejmon, kie strangaj okazas. La poŝtisto portas misterajn pakaĵojn kun eksterlandaj poŝtmarkoj; ekzotikaj gastoj vizitas nin; mi mem subite aperas, frumatene aŭ noktomeze, ege neformale vestita, por ĉasi petolantan katon. Kiam Juan Régulo Pérez vizitis mian hejmon, li tuj identigis la dometon ĉar siama kato atendis ĉe la fenestro de mia litĉambro, tirante flanken la kurtenon por pli bone kontroli la irojn kaj venojn en nia strateto.

Sed la plej kria sensacio en nia strateto estis dum tiu vizito de Julio Baghy, post la Universala Kongreso en Harrogate. Ni estis

invititaj al festmanĝo en la urbodomo, kun granda grupo de italaj esperantistoj. Montevideo ne estis invitita. Sed, kiam ni jam estis iom malkomfortaj en miaj elegantaj vestaĵoj, la telefono sonoris. Ĉu la italoj en sia aŭtobuso rajtos unue halti proksime al mia hejmo – por vidi, fotografi kaj eĉ filmi la faman katon kaj respektu saluti mian patrinon? Mi ne dubis pri la taŭga konduto almenaŭ de mia patrino, kaj jesis. Mi portis la katon eksteren; mi tenis ĝin en miaj brakoj kaj per unu mano tenis ankaŭ kondukrimenon. Motorbiciklo preterpasis sur la ĉefstrato kun eksplodoj kaj muĝo; Montevideo ektimis, risorte piedbatis mian bruston, rompis la kondukrimenon kaj malaperis inter la arbustoj de iu najbara ĝardeno. La piedbato estis tiel forta kaj la tuta evento tiel fulmrapida, ke mi tute ne vidis la forkuron. Julio Baghy alvenis ĝustatempe por vidi min kun senkata rimenopeco en la mano kaj tia mieno, kian oni kelkfoje vidas sur la vizaĝo de la luno.

La kato rimarkinde mankis.

Kelkaj kurtenoj moviĝis ĉe najbaraj domoj, sed neniuj folioj moviĝis en najbara ĝardeno, por sugesti ke kato sin kaŝas tie.

Mi daŭre mienis kvazaŭ aŭtuna luno aŭ nederlanda fromaĝo kaj firme tenis la rimenopecon por ke ankaŭ tio ne eskapu; sed la kara veterana aktoro, kiu jam dum kelkaj tagoj studis la siaman lingvon kaj eĉ ekparolis ĝin, subite ekagis. La longaj grizaj haroj hirtiĝis en la venteto; Julio Baghy iris tien-reen tra nia strateto, gestante, grimacante, kaj eligante serion de miaŭoj, adekvataj por trompi ne nur homon, sed katon. Du junulinoj hazarde alvenis sammomente.

«Miaŭ! Miaŭ! Miaŭ!»

Ili videble hezitis. La poeto volis klarigi kelkvorte al ili, ke li ne estas freneza, li vokas katon; sed bedaŭrinde li ekklarigis hungare. La junulinoj rapidis al la fino de la strato, malgraŭ la ĉarma rideto kiu estis lia dua provo klarigi; la kurtenoj pli moviĝis. «Miaŭ! Miaŭ! Miaŭ!» Sed finfine reeĥis el ĝardeno timema, mallaŭta «Miaŭ». Julio Baghy turnis la kapon kaj la miaŭadon tiudirekten. La eĥo plilaŭtiĝis, ĝis Montevideo reaperis kaj kuris al sia fidinda amiko, samlingvano, kelkajn minutojn antaŭ la alveno de la itala grupo. «Ne forgesu iam rakonti,» diris la kara homo, «kiel mi remiaŭigis ĝin!»

Montevideo ja spicis la vivon de la loĝantoj en nia strateto, dum la ferioj. Ĝi ankaŭ lerte turmentis sian «avinon», mian patrinon. Ĝi ornamis la bankuvon per elegantaj makul-desegnoj; frakasis tepoton; promenis sur

gladotaj tolaĵoj; renversis diversajn ujojn; sidis en la banĉambra ŝranko, el kiu fiksrigarda bluokula inspektado povas tre ĝeni gaston iom pudoran; ŝtelis buteron,

kolbasojn, hepataĵon; volis ludi futbalon per ovo sur la tablo; por variigi la aferon, provis la saman ludon kun ampolo; ekdormis sur ĉapelo; ŝiris kurtenon ĉar alia kato estis en la ĝardeno; kaj unufoje tiel faligis mian patrinon apud la ŝtuparo, ke mi devis forlavi sangon de ŝia frunto kaj dum kelkaj tagoj la najbaroj povis ĝui diversajn konjektojn pri ŝia ekimoza okulo. Riĉa, eventoplana, estis la vivmaniero de la kato dum ferioj.

Tamen, la feria vivo ne estis la plej granda parto de ĝia vivo. Dum tiuj ses junaj jaroj, ĝi loĝis plej multe en mia vicdirektorina apartamento en instruistina seminario. Ĝi estis la sola kato en la domo, kie loĝis naŭdek studentinoj, dommastrino, du koleginoj kaj pluraj servantinoj. La dommastrino adoris ĝin; ĝia dieto estis abunda kaj varia. La kolegia ĝardeno estis vasta kaj sekura. Inter bankedoj kaj ĉasekskursoj, Montevideo ĝuis la karesojn de granda haremo. Ne temis pri katinioj; la esperantista kato sidis sur neŭtrala fundamento, senigite de baza bezono; sed ĝi ĝuis la variajn karesojn de pli ol cent virinoj. Ĝi dormis sur junaj molaj sinoj, svenetis ronrone ĉe belaj junaj brustoj, reciproke frotis sin volupte kontraŭ delikataj junaj manoj, sibarita despoto senrivala, ĉiutage ekstazante inter diversaj plezuroj.

Ĝi obeis al neniu. Egoismo, kiu en homo estus patologia, estas en kato nur natura, eĉ iom ĉarma. Kun ĉio materia, kion ĝi bezonis, amata, karesata, adorata, tiu kato vivis pli agrable ol multaj milionuloj, ĉar ĝi ne havis respondecon, devojn,

• La paro en 1956



familiajn problemojn; neniuj petis de ĝi ion ajn; ĝia sola devo estis, resti bela, petol-ema, karesema: vivotasko de pura estado.

Ĝi tamen iom kontribuis al la kolektiva vivo de la kolegio. Ĝi rolis en studentinaj skeĉoj kaj kantoj, kaj kelkfoje aperis en stilekzercaj eseetoj. Unufoje ĝia portreto nigra-blanka eĉ aperis en universitata gazeto. Ĝi iam skribis leteron al la redaktoro de loka ĵurnalo, aŭ almenaŭ subskribis la leteron: fotoĵo de la piedsigna subskribo aperis en la ĵurnalo. Iam, kiam la kolegio estis malfermita al la publiko, Montevideo sidis sur balustrado ĉe la ĉefpordo kaj miaŭe salutis la plej altrangajn gastojn. Plurfoje la kato salutis, distris kaj amuzis inspektorojn. Ni esperis, ke kelkfoje ĝi malatentigis ilin pri etaj mankoj.

Unufoje ĝi tute demoralizis iom rigoran ekzamenistinon. La studentinoj timis ŝin; eĉ la stabaninoj iomete timis ŝin. Laŭ mia kutima devo, mi invitis ŝin temanĝi kun mi. Ŝi eksidis: Montevideo tuj sentis fortan antipation; ĝia metodo por montri sian malaprobos estis, ĉirkaŭiri la ĉambron, paŭzante du-tri fojojn por kritike fiksrigardi la fraŭlinon. Tio ĉi eble ŝajnis tute neatentinda; sed imagu, ke la ĉirkaŭirado kaj sporada fiksrigardado daŭrus dum horo kaj duono; ke la kritik-

ema kato farus laŭ neregula temposistemo, tiel ke la viktimo kredus, ekzemple, ke nun ĝi forlasis la okupon kaj ekdormas malantaŭ la sofo, sed poste bruna kapo kaj bluaj okuloj reaparus de malantaŭ la sofo; ke ia iom hipnota efiko de la procedo igus la viktimon konstante movi la okulojn kaj turni la kapon. Tiu ekzamenistino preskaŭ ne temanĝis.

Alia ekzamenisto, pedagogo sufiĉe renoma en sia propra fako, vekis simpatio ĉe Montevideo, kiu ronronis kaj permesis karesojn; sed ankaŭ tiu ne temanĝis tiel abunde, kiel li kaj mi intencis; Montevideo ŝtelis lian sandviĉon. Post tiu heroaĵo, ĝi iĝis eĉ pli amata inter la studentinoj.

La eta aŭto-kato konis nur tiun perfektan vivon de lukso, karesoj, senrivala amo, ĝis septembro 1962. Tiam mi iĝis direktorino de alia kolegio, kaj ni translokiĝis. ■

La 34-paĝa *Dekdu Piedetoj* estas la dua libreto verkita de Marjorie Boulton pri siaj katoj. Ŝi memeldonis en 1956 ankaŭ la simile ĉarman *Kvarpieda Kamarado*, 48-paĝan libron pri ok monatoj en ilia vivo.



LA TRADUKOTA TEKSTO montriĝis sufiĉe malfacila, verkita en lingvaĵo iom malnovstila kun pluraj armeaj fakterminoj kaj vortoj uzataj en eksa senco. Alvenis tamen kvin laŭdindaj konkursaĵoj – kvar de individuoj kaj unu de triopo, kiu tamen havis tempon traduki nur la unuan trionon de la teksto. (Distrocele mi rigardis ankaŭ la provon de la Gugla Tradukilo ĉe **translate.google.co.uk**, kiu mistere disponigis al mi du malsamajn esperantigojn depende de la uzata retumilo. Dankon al Vilĉjo Walker pro tiu ideo!)



in the matter of. Tri elektis *koncerne* + akuzativon, sed unu mislokis la *n*-finaĵon, skribante *koncernen atingiĵoj*. Estu *koncerne atingiĵojn*, aŭ prefere *atingojn*, formo dekoble pli ofta ol *atingiĵoj* laŭ la serĉilo ĉe *tekstaro.com*. Tute eblis ankaŭ *rilate* + akuzativo, *rilate al* kaj *kiam temis pri*. (Guglo proponis *en la afero de*, tro laŭvorte.)

general culture and attainments. Ĉu *ĝenerala* aŭ *ĝeneralaj*? Malfacile. Du partoprenantoj pluraligis la vorton, kaj unu pliklarigis per *niajn ĝeneralan kulturon kaj atingojn*.

pretty level ground. Jen metaforo pri samrangeco aŭ samniveleco, kiun nenio malhelpas rekte traduki. Oni tamen hezitis inter *tero*, *tereno* kaj *grundo*. Elegante, unu kandidato postmetis la adjektivon – *grundo pli-malpli ebena* – por emfazi la ebenecon kaj malakcenti la

grundon mem. (Elefante, la pli primitiva el la du Guglo-tekstoj tradukis per *bela nivelo*.)

true, it was always happening that. Por *true* plej sukcesis la solvoj, kiuj iel enhavis *ja*. Unu uzis la verboformon *okazadis*, kontribuante al la pasinteca stilo de la rakonto. Sed *ĉiam* ŝajnis troigo: per angla idiomajeto la aŭtoro volis diri nur *tre ofte* aŭ *konstante*.

would be singled out. Plaĉis *oni elamasigis unu el ni* (aŭ *elgrupigis*), dum *unu el inter ni* ŝajnis al mi senbezone peza. Kvankam la anglan vorton *would* oni ofte prave traduku per *us-verbo*, ĉi tie tamen neniel temas pri ago imaga aŭ fantazia: tiu ĉi *would* havas la sencon de *used to* kaj prezentas agon, kiu ofte kaj ripete okazis – nu ja, okazadis!

freakishly. Arbitre aŭ kaprice.

inflections. Ĝenerala gramatika termino: *fleksioj*. Du konkursanoj anstataŭe provis la obskuran vorton *infleksioj*, kiu laŭ PIV signifas fleksion per interna vokalaŝanĝo, kiel ĉe *foot—feet* en la angla lingvo.

long rightly dead. Tio plibonstiliĝis per subtila enmeto de *kaj*: *delonge kaj prave mortinta*. Prave estas, ke la priparolata lingvo mortis. Tio cetere okazis antaŭ longe. Sen *kaj* oni eble komprenus, ke la prava afero estas la praeco de la morto. Ja subtile.

while. Dum, ne dume, malgraŭ tio, ke la antaŭa parto de la frazo finiĝas per punktokomo.

fancied artistic tendency. Plaĉis *imagata arta inkolino* kaj *supozita arta emo*, interalie.

failed to justify itself. *Malsukcesis sin pravigi*, sed mi menciuj ankaŭ *fiaskis en sia pravigo* – aŭ eble *sia pravigo*.

told off. Ŝajne la senco estas «formombrita disde la grupo, por aparta tasko», uzante *tell* en la arĥaikiĝinta senco *nombri* – kion faras *teller* en banko, aŭ kiel en *a clock tells the time*. Simila estis *singled out* antaŭe. Preskaŭ ĉiuj uzis la verbon *ordoni* aŭ la substantivon *ordono*, sed eble oni povus elturniĝi per *apartig* aŭ *elpluki por la tasko*. (La Gugla Tradukilo tie tute frenezigiis inventante la verbon *eldiŝi*.)

hammer out scales. Ĉe piano, supozeble – do muzika ekzerco, por kiu *gamoj* estas preferinda al *skaloj* (kaj certe al *skvamoj* laŭ miskomprenego ĉe Guglo). *Hammer out* impresas min kiel esprimo relative ofte uzata en la angla, sed ĝi malmulte aperas en vortaroj. Ĝi elvokas la fuŝludadon de iu, kiu tro forte batas la klavojn. Oni uzis *marteli*, *marteladi*, eĉ *martelumi*; el tiuj tri kredeble la meza plej bone kaptas la daŭran sencon de *out*. Ankaŭ *gurdi* estis interesa propono.

bedew. Malsekigi delikate, per gutoj. Miatakse sukcesis *surrosi* (aŭ ĉu *prirosi*?), *rosigi* kaj la bela *rosumi*. *Rosumo* estas la akvo, kiu formiĝas sur malvarmaj fenestroj ktp, do afero sufiĉe simila. Aliflanke oni rajtas rigardi *bedew* kiel fosiliĝintan eksmetaforon, kiu nun egalas al *priverŝi*.

senseless keys. Ne tute klare, kion tio signifas: ĉu la klavoj estis *sensencaj* aŭ

sensentaj? Kaj oni ja disopiniis pri tio. Mi tamen suspektas, ke la aŭtoro celis diri, ke la tuta ekzerco estis *sensenca*, ĉar ĝi malŝparis la tempon kaj nenion instruis. Laŭ tiu ideo unu persono uzis *senutilaj*.

subjects. *Studobjektoj* aŭ *studtemoj*, jes, sed ankaŭ *fakoj* estas plene ebla kaj agrable konciza, almenaŭ ĉi-kuntekste.

ambition soared no higher. *Ambicio celis ne pli alte*. Du kandidatoj provis la verbon *sori*, kio komence dubigis min. Laŭ PIV soras nur aviadiloj – sed verdire ĉu ne ankaŭ birdoj, kaj, kun figura senco, homaj sentoj?

crack a whip. *Kraki* estas ne-transitiva: vipo krakas, kiam oni ĝin krakigas. En unu konkursaĵo oni lerte skribis *klaksvingi*.

circus-ring. Ĝis nun termino por tio ne vere stabiliĝis en Esperanto, iom kurioze. PIV nomas ĝin *areno* sed ŝajnas aludi nur la cirkojn de la antikva Romo. La vorton *cirkocirklo* uzitan de unu partoprenanto mi apenaŭ kapablis digesti. Eble *cirkoringo* plej taŭgas, sed iu sukcese evitis la problemon per eta revortumo: *sub cirkotendo*.

weary doings. La *tedaj far(ad)oj* de *gereĝoj* impresas tute esperantece: oni ja povus pli laŭvorte paroli pri *reĝoj kaj reĝinoj*, sed se oni ekverkus la frazon en Esperanto, ĝi preskaŭ certe enhavus mencion de *gereĝoj*. *Intrigoj* ŝajnis tro forta.

would have scorned. Ĉiuj kaptis la sencon de la nuntempe maloftiĝinta strukturo *scorned to do*, nome «senti, ke tion fari estus maldignige». *Malestimi* estas semantike tre proksima kaj bone

sidus ĉi tie. Iu proponis *prifajfi*, pensadigante min pri la origino kaj nuntempa signifo de tiu kunmetaĵo: mi fine konkludis, ke ĝi estas vorto tro vastasenca por la nuna nocio, kapabla esprimi ian ajn malaprobon aŭ indiferecon ligitan al realaj aŭ imagaj ekfajfoj. Ĉi-foje *would* verŝajne ja iĝu *us*-verbo, ĉar la frazo starigas hipotezan situacion: se oni prezentus tion al ni, ni malestimus ĝin. Aliflanke eblas diri, ke temas pri situacio efektive okazinta en la fikcia «realaĵo».

to excel. Malestimus do... *elstari* aŭ (cele al plia klareco) *elstaran atingon*. Senobjekta *superi* ŝajnis ne sufiĉe klara.

dogged determination. Ĉiu konkursano prave uzis la radikon *obstin-*, ekzemple en *senlaca obstino*, *obstina intenco* aŭ *rezoluta obstino*.

to shirk and to evade. Neniel facile, ĉar ambaŭ verboj havas pli-malpli la saman signifon, kiun en Esperanto kovras nur *eviti*. (Gugle: *obstina decido eviti kaj eviti...*) Mi ŝatis la proponon *pigri* de pluraj, sed trafa estis ankaŭ *eskapi kaj eviti laboron*, ĉe kiu la aldono de tiu rekta objekto stiras *eskapi* al la ĝusta haveno.

dead level. Miainterprete la nivelo estis do tute ebena, tute plata, tute sama por ĉiuj, sed eble enestas ankaŭ la ideo, ke la nivelo estis nula, sen enhavo, sen utilo. Pri *morta* nivelo certe ne temas (kaj tion surtabligis nur Guglo).

tempered by. *Hardita* aŭ *malmoligita* — ne *moligita*, kiel iu skribis! Ĉu tamen *by* estu *per* aŭ *de*? Oni povas argumenti, ke la rolantoj fortigis sian nescion almiksante sian malobeemon, do *per* tiu ĉi, kaj tion preferis la plimulto. Sed

ja egale validas la opinio, ke la malobeemo mem iasence malmoligis la nescion.

a wide range. *Vasta gamo.*

subjects of healthier tone. Verŝajne sufiĉas *fakoj kun pli sana tono*. Oni ne hezitu traduki pli-malpli laŭvorte, se la rezulto legiĝas bone kaj estas internacie komprenebla. Aliaj provis *pli sanigaj*, *pli vivinstigaj* — aŭ *pli bonfartaj*, sed tiu ĉi prefere estu *bonfartigaj*, ĉar la fakoj mem ne bonfartis. Plia ideo al mi enkapiginta estas enmeti la vorton *etose* antaŭ *pli sanigaj*.

in which we were free to choose. Ili havis liberan elekton *el* aŭ *inter* la fakoj.

consider education. Eblas traduktian *consider* aŭ per *konsideri* aŭ per *rigardi*. Por *education* oni proponis *edukado*, sed ankaŭ *klerigo* kaj *pedagogiaj*. Origine *edukado* signifis *upbringing* aŭ (pri bestoj) *rearing*, sed oni jam de longe emas ĝin uzi rilate instruadon.

his own particular line. Por tiu *line* — tra la studfakoj — sufiĉas *vojo*.

special knowledge. *Speciala scio*. Plaĉis *fakoscio*, sed eble tio estus pli proksima al *specialist* aŭ *specialised knowledge*.

struck [...] as simply uncanny. Du personoj inversigis la frazon dirante, ke oni opiniis aŭ taksis tion mistera. Sed oni povis reteni la anglan strukturon per *impresi*: *kiu impresis ilin kiel ...* Iu proponis *kontraŭnatura*, tute bone, sed *uncanny* povus esti eĉ *supernatura* laŭ mi.

accoutrements. *Akcesoraĵoj*. En la armea fakingvaĵo tiu angla vorto signifas soldatan ekipaĵon krom armiloj kaj

uniformo, sed en nia teksto ja tamen ŝajnas temi pri kromaj partoj de la uniformo.

colours. Konvencia metonimio por arma *flago*. Eble *koloroj* en Esperanto havas tiun sencon en heraldikaj kuntekstoj, sed pli klara ŝajnas *flago* – aŭ ĉi tie *flagoj*, ĉar oni parolas pri multaj regimentoj samtempe.

mottoes. Estu *devizoj*, pro la rilato al blazonoj. *Motoj*, almenaŭ laŭ PIV, estas citaĵeto komence de verko aŭ ia frapfrazo pri kongresa temo aŭ simile. Certe ne ege malsamaj aferoj, ĉiel ajn.

composing. *Konsistigi* estis la plej simpla kaj rekta solvo, sed eblis ankaŭ elturniĝo per *el kiuj konsistis*. (Guglo uzis jen *kunmeti*, jen la tute malkonvenan *komponi*.)

facings. Tio estas la interna ŝtofo de vesto, precipe la kolora parto videbla ĉe la kolumo kaj manumoj de soldata palto. Do mia opinie plej trafis *kolumoj kaj manumoj*. Ies propono *kudrobordoj* mis-havis *bordo* (tero apud akvo) en la senco de *bordero* (randiĝo).

faultless. *Senmanka* aŭ eble *senriproĉa*.

moved familiarly. *Vagadis* estis bona ideo, dum *traktis kiel familianojn* vagadis iomete tro for. Kial ne simple *moviĝis familiare*?

knew the names. Nur unu konkursano skribis *sciis la nomojn*, laŭ mi ĝuste; ĉe la aliaj: *konis*. Se oni konas nomon, oni scias nur, ke oni jam ie vidis aŭ aŭdis ĝin; sed se nomon oni scias, oni havas la detalojn komplete klaraj en la menso.

colonels in command. Du elektis *koloneloj komandantaj*, sed *estraj koloneloj* estis interesa provo.

squander. Plej popularis formoj de *malŝpari*, sensurprize. La verbon *disipadis* elektitan de unu partoprenanto mi ne kontraŭis: ja malofta radiko, sed en la angla lingvo *squander* mem ne oftegas.

prone. Ne nur *kuŝanta* sed *surventre*. Ĉi tie leviĝas la harfenda demando, ĉu li malŝparis tempon *kuŝanta* aŭ *kuŝante*. Necesas decidi, ĉu la kuŝado priskribas lin (li – kiu kuŝis – malŝparis tempon) aŭ rilatas al lia maniero agi (li malŝparis tempon per tio, ke li kuŝis). Eblas argumenti favore al ambaŭ.

lawn. En sia suplemento al la *Plena Vortaro* en 1953 Gaston Waringhien enkondukis la vorton *gazono* (paŭsaĵon de la franca *gazon*), kvankam jam de 1934 samvortare aperis *razeno* (de la germana *Rasen*). Post tiu historia kuriozaĵo, *gazono* ŝajnas nuntempe iomete pli kutima, kaj efektive neniuj uzis *razeno* ĉi-traduke. Tamen por eviti decidon inter la du vortoj oni povus elekti *herbotapiŝo*.

heedless of challenge. *Ignorante defiojn* aŭ *senatenta al provokoj*. Teorie ankaŭ *sendistre* eblis, sed ĉar *distri* plej ofte rilatas al amuzado (*entertain*), ĝi riskus miskomprenigi legantojn.

poring over. Simple *ekzameni* aŭ (verŝajne pli trafe) *studi*.

tattered. Tia libro estas ĉifita. Ĉifona aŭ ĉifonigita povas esti nur vesto aŭ almenaŭ io el ŝtofo.

Army List. Jen listo de la oficiroj en la Brita Armeo ekde la komenco de la 18-a jarcento. Plej bone oni nomu ĝin simple la

Armea Listo. Se oni eldonus tradukon de la tuta verko, oni kredeble metus tie pied-noton. (Laŭ Guglo: *Armita Listo*. Tute ne.)

was of another character. *Havis alian karakteron* – aŭ *estis alikaraktera*, sed ial tiu kunmetaĵo estas ne tre kutima en nia lingvo.

took a more untrammelled range. Plaĉis al mi *ampleksis teritorion pli senbaran*. La aliaj partoprenantoj tro fiksiĝis ĉe la ideo, ke *range* nepre estu *gamo*.

swagger. *Pranci*. La vortaro de Montagu Butler (1967) registris la figuran sencon «walk in arrogant manner, swagger». Dualoke: *paradi*.

Lincoln green. Nomo de koloro (kaj ankaŭ de regiono en la urbo Leeds, al kiu la Gugla Tradukilo fuŝdirektis sin). La referenco ne bone tradukiĝas al internacia legantaro. Ĉu endas eĉ reteni ĝin? Eble, ĉar oni ja parolas pri la enkapigo de ĝustetiaj detaletoj. Indas almenaŭ iel klarigi, ke tia verdo estas hela.

sporrans. Antaŭ precize 25 jaroj en ĉi tiu rubriko William Auld notis: «La vorto *sporano* mankas en la plimultaj vortaroj, inkluzive de PIV, sed ĝi havas ekzistrajton kiel vesta specialaĵo (same kiel *kimono*, *sario* k.a.). Aliflanke, multaj ne komprenus pri kio temas, kaj konsilindus aldoni piednoton. Ĉu eble *antaŭsaketoj* preferindus? (Afero de gusto, ŝajnas al mi.)» Ĉi-jare iu trovis *burso* – laŭ PIV: «monsaketo alligita al zono kaj libere pendanta» – kiu estus perfekta, se ĝi ne estus vortara fantomo apenaŭ uzata. Al mi ŝajnas akceptinda la kunmetaĵo *kiltopoŝo*, sed ankaŭ ĝi tute ne enuziĝis. Eble oni

simple registru *sporano* en PIV, kaj punkto-fino!

without exciting notice or comment. La strukturo *sen X-ante* estas sintakse ne ebla: oni diru *sen X-i* aŭ, plej tradicie, *ne X-ante*. Tre eleganta estis ies frazturno *vek*i ĉe mi nek atenton nek komenton.

fauna. *Faŭno*, ununombre, ĉar temas pri bestaro kolektive.

come to the right shop. Diversis la ideoj: *adreso*, *butiko*, *deponejo*, *fonto*, *vendejo*. Mi mem elpensis la esprimon *la ĝusta ĝiĉeto*, kiu ankoraŭ ŝajnas al mi trafa.

“wallowed”. Iu diris *kuŝas en koto*, bone laŭsence sed ne meritante la citilojn. *Sin* «*polvobanas*» donis terminon ja intercitoligindan, sed *wallow* ordinare implicas, ke la polvo estas malseka, do efektive ŝlimo. Tial eble *sin* «*ŝlimbanas*». *Koto*, cetere, estas ia ajn tersimila malpurigaĵo; por la angla *mud* ofte pli taŭgas *ŝlimo*, malgraŭ la iom tro limiga difino «sur la fundo de akvujo» en PIV.

stalked. *Kaŝĉasi*, aŭ eble sufiĉas nur *ĉasi*. Mi tre ŝatis ies uzon de la vortordo *kastorojn kapti kaj sovaĝajn meleagrojn ĉasi*.

grizzly. *Griza urso*, subspecio de la bruna.

pretty pressing ways of the constrictor. La plej sukcesa propono ricevita estis *konstriktaj karesoj de la boao*. Reteni la aliteracion provis ankaŭ la traduko *korpremaj kutimoj de konstriкта boao* – tamen ne vere temas pri *korpremo* laŭ la ordinara senco de tiu vorto, kaj oni cetere tie iom perdis la humuron. Mi

proponu alian aliron: *sufiĉe sufoka konduto*. (Kaj laŭ Guglo? Nu, *belaj urĝaj manieroj de la konstriktoro...*)

in fine. Malnova maniero diri *fine*, *resume*, *entute*, kiel ja komprenis ĉiuj konkursanoj.

haunts and habits. Denove oni notu la aliteracion. Belegis *kioj kaj kieloj*, sed ankaŭ la pli prozecaj *kuŝejoj kaj kondutoj* aŭ *kutimoj* montriĝis feliĉiga.

burrowed, strutted, roared, or wriggled. *Tunelas, pavadas, muĝas aŭ tordiĝas* bone redonis la impreson. Unu persono simpligis al *fosis, trotis, blekis aŭ rampis*, sed tio eble perdas la efekton de la iomete malpli ĉiutagaj anglaj verboj. En Esperanto tiuj verboj prefere finiĝu per *-as*, ĉar temas pri speco de nereakta «parolo»: tio, kion la aŭtoro sciis.

took for my province. Nenies solvo vere kontentigis: tian figuran sencon ŝajne ne konas la Esperantaj vortoj *provinco kaj areo*. Eble oni povus diri *mi prenis sur mian kampon*.

equipment. Tio efektive signifas *intelekta ekipaĵo*, laŭ figura senco tute malmoderna, sed du partoprenantoj provis *kapablo*, kies koncizeco plaĉis al mi.

supposing. Se diri *supozu*, ke ..., la postaj verboj ricevu *us*-finaĵon. Iu proponis *nenion* pli ol *se ... -is*. La angla teksto tamen havas punktokomon antaŭ *still*, do kredeble oni traktu la *supposing*-frazon kiel memstaraĵon kaj ja uzu *supozu*, ke ... La strukturo de *supozante*, ke ... estas gramatike neebila tiufraze, ĉar *e-participo* montras plian agon de la subjekto de la ĉefverbo, kaj la ĉefverbo ĉi tie estas *it was necessary*.

the atmosphere was electric with excitement. *La atmosfero elektriĝus pro ekscito*. Oni povis uzi ankaŭ *etoso*, eble pli nature en Esperanto, sed tiam oni havus proksimaj inter si tri vortojn kun komenca *e* – aŭ eĉ kvar, se oni skribus *estus elektra*.

still. Tri elektis *tamen*; unu *ankoraŭ*. Ambaŭ estas teorie defendeblaj, sed *tamen* ŝajnas preferinda, donante la sencon «malgraŭ tio, kion mi ĵus diris pri la atmosfero».

slot. Piedspuro de besto. La vorto estas parenca kun *sleuth*, mem mallongigo de *slleuthhound*.

trappers. Pli bone *kaptilistoj* ol *kaptistoj* aŭ *ĉasistoj*.

realistic. Oni uzis kaj *realeca* kaj *realisma*. Striktasence tiu ĉi signifas «rilata al *realismo*», do al certa arta stilo. Sed ja temas pri stilo de rakontado.

backwoods. Tiu vorto origine signifas sovaĝa(j)n arbaro(j)n, sed poste ankaŭ ian ajn malproksiman neeloĝatan regionon. Kvankam *sovaĝejoj* do ŝajnas konveni, per ĝi oni tamen eble riskus, ke la leganto momente mispensu pri regiono loĝata de sovaĝuloj.

all went for nothing. Ĉio valorus *neniom* aŭ *nenion*. Du partoprenantoj aldonis klarigan ĉi post ĉio.

pemmican. La vorto *pemikano* sidas en PIV pli ol duonan jarcenton, do certe estas uzebla ĉi tie.

compounded. Por prepari *pemikanon* oni pastigas sekigitan viandon kaj almiksas grason kaj berojn. Kurioze neniu uzis la relative evidentan vorton *kunmeti*; oni preferis *kombini*, *miksi*, *prepari*.

damned. Prave skribis *kondamnis* ĉiu homa konkursano. (El la Gugla datum-bazo ŝprucis la pli teologia kaj tre forta verbo *damnis*. La Butler-vortaro allasas al *damni* la metaforan signifon «condemn as a failure», sed se tiu senco ekzistas en Esperanto, oni renkontas ĝin maloftege.)



Premion al Edmund Grimley Evans, kiu afable konsentis ĝin fordonaci al partoprenintoj de la Studa Semajnfino en aprilo. La dua plej bona traduko venis de tri membroj de la Esperanto-Grupo de Skipton, sed ili tradukis nur la unuan alineon.

Laŭ la siatempa stilo de Bill Auld, jen sekvas mozaiko el la plej bonaj partoj de ĉiuj konkursaĵoj:



Koncerne niajn ĝeneralan kulturon kaj atingojn, ni junuloj staris sur grundo pli-malpli ebena. Ja konstante okazadis, ke oni elgrupigis unu el ni en iu ajn momento, kaprice kaj senkonsidere pri ties propraj preferoj, por lukti kun la fleksioj de iu idiota lingvo jam delonge kaj prave mortinta; dum alia el ni, pro iu imagata arta inklino, kiu ĉiam malsukcesis sin pravigi, estis senaverte apartigita por marteladi gamojn kaj ekzercojn kaj prirosi la sensencajn klavojn per larmoj de laco aŭ ribelo. Sed en fakoj komunaj por ĉiu sekso kaj rigardataj kiel necesaj eĉ por tiu, kies ambicio celis ne pli alte ol klaksvingi vipon sub cirkotendo – en geografio, ekzemple, aŭ aritmetiko, aŭ la tedaj

faradoj de gereĝoj – ĉiu malestimus elstari. Kaj efektive, kiaj ajn estis niaj individuaj talentoj, ĝenerala senlaca obstino eskapi kaj eviti laboron tenadis nin ĉiujn ĉe pli-malpli sama plata nivelo – nivelo de Nescio hardita per malobeemo.

Bonŝance ekzistis vasta gamo da fakoj kun pli sana tono ol tiuj jam nomitaj, el kiuj ni estis liberaj mem elekti, kaj kiujn ni rifuzus rigardi kiel klerigon; kaj en tiuj ĉiu el ni sekvis la propran vojon, ofte atingante kvanton de speciala scio, kiu impresis la sensciajn pliaĝulojn kiel supernatura. Por Eduardo la uniformoj, akcesoraĵoj, flagoj kaj devizoj de la regimentoj, kiuj konsistigis la Britan Armeon, havis specialan allogon. Pri kolumnoj kaj manumoj li estis simple senmanka; inter ĉevronoj, insignoj, medaloj kaj steloj li moviĝis familiare; li sciis eĉ la nomojn de la plej multaj koloneloj komandantaj; kaj li malŝparis sunplenajn horojn surventre sur la herbotapiŝo, ignorante defiojn de birdo aŭ besto, per studado de ĉifita Armea Listo.


Miaj propraj atingoj havis alian karakteron – ampleksis, kiel ŝajnis al mi, teritorion pli vastan kaj senbaran. Dragonoj povus pranci en helverdo, fusilistoj povus porti sporanon super tartana pantalono, kaj vekus ĉe mi nek atenton nek komenton. Sed se vi serĉus precizajn informojn pri la faŭno de Ameriko, ĉe mi vi troviĝus ĉe la ĝusta giĉeto. Kie kaj kial bizono sin «slim-banas»; kiel kastorojn kapti kaj sovaĝajn meleagrojn kaŝĉasi; la griza urso kaj kiel

ĝin trakti, kaj la sufiĉe sufoka konduto de la konstrikta boao, – resume, la kieoj kaj kieloj de ĉio, kio tunelas, pavadas, muĝas aŭ tordiĝas inter Atlantiko kaj Pacifiko – ĉion ĉi mi prenis sur mian kampon. Mian kapablon la aliaj homoj plene agnoskis. Supozu, ke en la domon enportiĝus libro, en kiu oni ĉasas urson, kaj la atmosfero elektriĝus pro ekscito; tamen necesus, ke mi unue decidu, ĉu la spuro estis ĝuste priskribita kaj ĝuste sekvata, antaŭ ol la verko povu ricevi la stampon de plena aprobo. Verkisto povus famiĝi tra la civilizita mondo per siaj kaptilistoj kaj realismaj sovaĝaj arbaroj, kaj ĉio valorus neniom. Se lia pemikano ne estus ĝuste kunmetita, mi

kondamnis lian atingon, kaj oni ne plu aŭdus pri ĝi.

• • •

Por la venonta konkurseto mi proponas tekston kun malpli longaj frazoj: bonvolu esperantigi la unuajn 17 alineojn – mal-longajn kaj konversaciajn – de la rakonto «The Magic Soap Pipe» el la infanlibro *The Magic Soap Bubble* de David Cory. La koncerna parto daŭras de «Ned had been reading» ĝis «his bedroom at home», kaj la tuta libro estas legebla ĉe gutenberg.org/ebooks/26944. La tradukota fragmento troviĝas ĉe esperanto.org/traduku, kaj en la sama paĝo vi trovos ligilon por sendi vian provon. ■



Mi povus ŝerce diri, ke aŭtorecon aŭguris mia unua hejmadreso: 58 Popes Grove, Strawberry Hill, Twickenham. Mi estis pli bonsana ol Alexander Pope, kvankam malpli naturdotita; sed eble Muzo iam vizitetis tiun adreson ...

Miaj gepatroj ŝajnis neprobabla duopo. Mia patro estis filo de karboministo, kiun oni multe viktimitis pro lia sindikata agado; lia patrino, kiu frue vidviniĝis havante sep infanojn, devis havi fortan karakteron. Kuragiĝite de percepta lernejestro, mia patro post multa strebado licenciĝis pri historio ĉe la nuna Universitato de Manĉestro, fariĝis instruisto kaj akiris plian licencion ĉe *London School of Economics*. Mia patrino avo estis malgrandampleksa negocisto kaj inventisto en la mondo de ceramikfornoj, tial la infanoj grandiĝis en modera komforto. Mia patrino fariĝis instruistino en bazlernejo – kaj, kiel okazis tiutempe, tuj maldungiĝis, kiam ŝi edziniĝis. Mi opinias, ke tiuj nekongruaj homoj havis nekutime sukcesan geedzecon – dum dudek jaroj eĉ ne unufoje mi aŭdis kvereli miajn gepatrojn.

Ambaŭ estis entuziasmaj por eduki min. Trijara mi jam flue legis, ŝategis rakontojn, baldaŭ provis inventi ilin; ŝategis simpligitan historion, facilajn versaĵojn; kiam mia nazo ne ŝvebis super libro mi lernis identigi oftajn florojn, insektojn, birdojn, aŭ ludis image per pupoj aŭ per ludilbestoj. Min ravis veraj bufoj, ranoj, dornfiŝetoj, raŭpoj, dorlotbestaj blankaj

Kiu pli bone povus rakonti pri **Marjorie Boulton** ol nia festato mem? Represita en nova traduko de **Brian Moon** estas artikolo pri ŝia junaĝa vivo.

musoj, tamen la esperojn de mia patro ne kontentigis la fakto ke mi ne kapablis kapti pilkon.

Kiam mi estis kvinjara la leĝo ordonis, ke mi iru al bazlernejo, tiel forte bremsante mian edukadon, kaj enkondukante min al kulturo de amasrutinoj (ja necesaj kiam temas pri almenaŭ 30 infanoj en la klasĉambro) kaj multego da punbatoj. Mi ĉefe evitis punadon per la scioj, per kiuj min jam provizis miaj gepatroj, kaj per konfuzita obeemo. En la krimlisto troviĝis ne nur Parolado, sed ankaŭ Paĝturnado (dum iu malrapide fuŝlegis), Eraroj kaj, pli riproĉinde, Ĝustigoj, kio instruis al ni, ke provi forigi eraron estis grave malbonkondukte.

Tamen unu veran servon faris al mi ĉi tiu misedukejo: nigra tabulo evidentigis, ke mi estas miopa. Okulvitroj treege utilis al mi: multon, kion mi obeeme imagis, mi nun vidis, kaj fojfoje mi eĉ kaptis pilkon.

Ekestas kompato

En miaj memoroj pri la bazlernejo ne inkluziviĝas feliĉaj horoj aŭ momentoj de ekscita lernado; povas esti, ke maljustas memoro. Miaj du unuaj instruistinoj estis afablaj, laŭ la tiamaj normoj, al «bonkonduka knabineto». Kiam mi estis proksimume sepjara, iu instruistino, vidante

iom ploreman infanon en momenta konfuziĝo pro ŝanĝo de klasĉambro, elektis malami tiun «hurlantan infanon» kaj persekutis min dum monatoj; malofte batante, nur tirante min tien kaj reen kaj prezentante min por ĉies malestimo – bagatelajo kompare kun tio, kion oni faras ĉiutage al infanoj ĉie en la mondo, sed por mi sufiĉe vunda. Post kelkaj monatoj, ŝi subite elektis alian knabineton, kiu fariĝu ŝia malamiko. Senutile, mi zorgis pri ŝi; verŝajne en mia kapo ekestis kompatio.

Iun tagon, mia patrino ricevis telegramon kaj tre nekutime ĉirkaŭdancis, kriante «Paĉjo fariĝas lernejestro!» Ni translokiĝis al Barton-on-Humber, tiutempe eĉ pli kampara ol ĝi hodiaŭ estas. Efektive mia patro estris malgrandan gimnazion sen batpunado. Mi memoras, ke en la municipa lernejo eĥadis batoj, kvankam mi evitis ilin, lernis iom, kaj havigis al mi kelkajn geamikojn.

Mi memoras, ke mi vagis laŭ la riverbordo de Humber, fantazianta, plukante sovaĝajn fragojn kaj rubusojn, kaj iom lernis la dialekton de Lincolnshire, kiun konis Tennyson. Inter miaj geamikoj estas ankoraŭ familianoj de nia afabla kuracisto, kaj mi ŝuldas multon al la bonega tiea dentisto – kiu ĉesigis sian karieron per tragika murdo, pelite de emociaj dilemoj.

Kiel mi poste komprenis, mia patro estis sufiĉe certa, ke Naziismo kaŭzos militon. Li jam militservis dum 1914–18, kiel pacisto en ambulancoskipo – kaj

gajnis la Militan Medalon. Li volis antaŭenpuŝi mian edukadon, kaj aranĝis, ke mi eniru la gimnazion dekjara anstataŭ deknunjara. Mi ankoraŭ dankemas.

Tie mi vere komencis lerni ion. Latino kaj la franca estis ĝuigaj; fiziko kaj ĥemio (primitivaj el hodiaŭa vidpunkto) estis pli malfacilaj sed interesaj; kuirado kun siaj teoriaj eroj estis interesa, kvankam sen la nuntempa melamino misproportcian parton de ĉiu leciono okupis frotlavado de lignaj tabloj. Hejmtaskoj fariĝis grava devo. Matematikon kaj sportojn mi mal-

amis. (Tiam ne molaĉa, mi ŝatis longajn promenajn en la kamparo, pli sekurajn ol hodiaŭ.)

La unuaj verkoj

Laŭ mia memoro, tiu estis la stadio de mia edukado kiam min plej ĝenis tiranado kaj pikmokado. Kompreneble, miaj krimoj estis pluraj: mi estis filino de la lernejestro (do, kompreneble, miaj studpoentoj sendube estis falsitaj, ktp); mi fuŝis sportojn; kaj, ŝanĝante la vestaĵojn por sportlecionoj, mi malkaŝis kion mia patrino opiniis pri subvestoj, kiuj ŝajnis al aliaj antikvamodaj. Ankaŭ rilate al normala konversacio mi trovis min limigita: hejme mankis radioaparato, maloftegis vizitoj al kinejo, nur por io nekontesteble eduka; min perpleksigis la kaŝa fervoro de multaj knabinoj pri ŝminko kaj modo.

Nun mi lernis multon akademie. Mi ankaŭ verkis rakontojn, poemojn, teatr-



aĵojn, senvalorajn sed memtrejnajn. Miaj klopodoj inkluzivis du teatraĵojn pri historiaj temoj por datrevenoj de mia patro kaj iun teatraĵon en kadro de la Hispana Enlanda Milito. Mi estis evoluganta fortan intereson pri politiko, kaj mia patro devis averti min ne menci aliloke tion, kion mi vidis pri senlaboreco, la maljunulino perforte kondukita al la malriĉulejo, socialismo kaj faŝismo; li maltrafis postenojn, ĉar oni suspektis lin tro radikala. Tamen dum siaj lecionoj pri historio li ja diris ion pri sindikatismo, kaj mia tre silentema patrino diris ion al mi pri *suffragettes* (aktivulinoj pri virina voĉdonrajto). Sed ne diskutu politikon ekster la domo ... Intertempe, la malnovan ĉevalejon malantaŭ nia domo mia patro konvertigis al ŝirmejo kontraŭ aeratakoj; ĝi eĉ havis trarampeblan urĝelirejon tra spaco, kiu antaŭe estis porkejo; li eĉ aranĝis, ke oni venigu elektron kaj havis planojn rilate verŝajnajn bezonojn. Li ankaŭ fruis, postulante ŝirmejojn por sia lernejo.

Tamen, en la somero de 1938, konstatante, ke tia ŝanco eble ne revenos dum longa tempo, Patro kondukis Patrino kaj min al Francio. Komence, oni sendis min al Eastbourne por intensa du-semajna kurso pri la franca. Ni vidis kelkajn el la parizaj vidindaĵoj, poste ni restis pli longe en *Le Lavandou*, tiam unu el la relative malmultekostaj stacioj de la Riviero. Mia scipovo de la franca ege pliboniĝis (kaj mi ja rimarkis, ke la provenca estas malsama); kaj mia ĝenerala memfido pligrandiĝis. Mi memoras, kiom ekscitaj tiam estis lunarkaj bulkoj kaj cikadoj,

lacertoj sur muroj kaj omaroj sur teleroj, kokinoj, kiuj kolektis panerojn falintajn de sur tabloj por ŝanĝi ilin al ovo por niaj omletoj, bonhumora *Madame* (la gastejestrino) kaj Mediteraneo ... kaj ke nia gaja kelnero estis itala rifuĝinto de Mussolini. En eta Barton en 1938, eĉ tiom malgranda eksterlanda vizito estis iom prestiĝa.

Sekretaj lecionoj pri verkado

Ĉi tiu sperto faris multon por mi, sed en proksimume la sama tempo nova planedo alŝvebis en mian mondon kun arda nova lumo. Iu instruisto volis eduki siajn infanojn en la kamparo, kaj en nian neston de kompetentuloj venis – almenaŭ tiel ĝin vidis adoleskantino – aglo! Vera, fervora verkisto kun eldonitaĵoj – Henry Treece. Li estis unu el la «Novaj Romantikuloj», amiko de Dylan Thomas, parte reaganta kontraŭ la konscie ideologiaj «poetoj de la tridekaj jaroj» (laŭ mia vidpunkto pli bona ol ili); sed Treece estis aŭtenta romantika poeto, kiu verkis ankaŭ romanojn, rakontojn por infanoj, kaj iom da literatura kritiko. Liaj poemoj eltiris el mi dekvinjara abundajn larmojn; lia vivsperto al mi imponegis. Li donis al mi multe da ekkomprenoj pri literaturo kaj la angla lingvo, kaj kelkajn konceptojn pri la literatura mondo, pli ĝenerale pri mondo pli vasta ol Barton. Plej grave por mi kia mi tiam estis, li ja kontrolis miajn poemojn kaj faris signifoplenajn komentojn – jen juste severajn, jen efektive kuraĝigajn. Tio, kio devis esti privata instruado pri lernprograma franclingva teksto, baldaŭ fariĝis (post honesta pristudado de la teksto) sekretaj lecionoj pri verkado kaj

pri tiutempaj verkistoj. Al li mi ŝuldas multegon, kaj mi certas, ke li faris pli ol iu ajn por taŭgigi min al universitataj taskoj. Li kapable gvidis lernejan enscenigon de *The Knight of the Burning Pestle* (La Kavaliro de la Brulanta Pistilo, parodia teatraĵo de Francis Beaumont – mi rolis kiel la malbona patrino) kaj kuraĝigis min, kiam mi enscenigis mallongan satiron pri nia lernprograma teksto *Macbeth*, kaj pri nia lernejo *Macmannin*; la timema knabino komencis amuzi kaj amuziĝi ...

En la jaro 1939 miaj samklasanoj kaj mi trapasis gravegan ekzamenon, tiam nomatan *School Certificate* (Atesto pri Baza Edukado); ĉar mi atingis Meriton pri matematiko, kio estis nepre por aliĝo al universitato, Meriton pri ĥemio kaj Distingon pri ĉiu el miaj ses aliaj studfakoj, universitato ŝajnis alirebla. Grandanime kaj prudente mia patro akceptis, ke mi vere volas studi la anglan, kvankam li revis pri historio.

Edukadon milito ne haltigas

Sed en la 3-a de septembro, hejme, ni aŭdis la atenditan militanoncon. (Mia patro fine aĉetis radioaparaton, «ĉar povus okazi ke ni bezonos aŭdi urĝajn instrukciojn registarajn».) Mi memoras, ke de nia korto ni vidis la gigantajn barajbalonojn super la urbo Hull, kaj ke en nia pretigita ŝirmejo ni metis litkovrilojn, biskvitojn, multajn utilaĵojn, kaj pendigis la kontraŭgasan kurtenon malantaŭ la pordo ... Estante en «neŭtrala zono» Barton spertis nek evakuadon nek evakuitojn, do la edukado daŭris sufiĉe normale

kun detaloj kiel porciolimigo, gasmaskoj, aerataj ekzercoj, kaj makabraj novaĵbultenoj.

Malgraŭ timoj, miaj jaroj en la Sesa Klaso¹ estis ĝenerale feliĉaj; tiuj, kiuj turmentis min, estis for, kaj ni ĉiuj laboris pri niaj preferataj studfakoj; mi trovis min inter junuloj kaj junulinoj aspiraj, celkonsciaj, amikaj. Sorĉite de Virgilio kaj Voltero, ensorbante Ŝekspiron, eklegante modernajn romanojn (mankis librovendejo en Barton, kompreneble, sed la loka apotekisto povis mendi kelkajn *Penguin*-librojn laŭ mia preskribo!), mi ĝuis verki por miaj geamikoj, kaj ankaŭ serioze. Leginte *The Prince* de Machiavelli, mi verkis *The Prefect*; post io de Hugo, ŝercan versan melodramon, kiu aludis nian grupon. Post novaĵbultenoj fantazi-aĵon, en kiu rolis Winston Churchill. Henry Treece daŭre helpis pri mia serioza verkado, ĝis li aliĝis al la flugarmeo.

En la unua jaro de la sesa klaso, pro sugesto de mia patro, mi provis ekonomikon – sukcesis, sed sen gloro.

Intervjuo en Oksfordo

Mia patro kolektadis informojn pri aliĝo al universitato por siaj sesa-klasanoj; ĉu Oxford estis nur revo de patro? Li estis agema – demandis al Somerville, ĉu eblus provi ties aliĝekzamenon. Li trovis la ekzaminaĵojn timigaj; dank' al Treece kaj al la lerneja biblioteko, mi efektive ĝuis ilin – kaj oni alvokis min por intervjuo.

1 En anglaj mezlernejoj lernantoj estas en la «sesa klaso» dum la du lastaj jaroj antaŭ la abiturienta ekzameno.

Trajnoj estis plenaj je soldatoj. Mi neniam antaŭe vojaĝis sole; mia patro akompanis min, trovis por si mem liton en Oxford, kaj la postan matenon sciigis min pri sia ekscita bonŝanco – vera, freŝa ovo por la matenmanĝo!

Por mia intervjuo mi surmetis mian plej bonan robon, kaj tre karakterize mi peze glitfalis en la korto kaj ŝiris ĝin neripareble, do mi frontis plurajn impresegajn renkontiĝojn en vestaĵoj trajn-ĉifitaj. Sed ĉi tie oni rigardis mian menson.

Sukcesa akiro de malgranda studstipendio (ne mia sukcesa glitfalo en la korto) tre mirigis mian patron, eĉ pli ol la ovo. La urĝa tasko estis nun trovi la ceteron de la bezonata mono, per akiro de *State Scholarship* (ŝtata stipendio). Mi dubas, ĉu mi iam en mia vivo laboris pli multe ol mi laboris en 1940–41 por *Higher School Certificate* (Atesto pri Supera Edukado).

Ek al Somerville

Milita celo Barton apenaŭ estis, sed transrivera Hull ja estis. Plej ofte ni rapidis nokte en nian ŝirmejon. Sirenoj, bomboj, lumĵetiloj, aviadiloj, kontraŭaviadilaj pafiloj, multe da ŝrapnelo falanta en nian korton, negravaj frakasigoj de niaj vitroj, dieto plimalboniĝanta sed ne katastrofa ... teruraj vidaĵoj de Hull brulanta, aĉaj detalaj sciigoj el nia nova radioaparato ... Kompreneble, ni estis relative bonŝancaj, nekredeble bonŝancaj kompare kun la plejparto de Eŭropo. Por sesa-klasanoj

proksimiĝis konskripcio. Eĉ mi konservis senton proporcian, kiam ni devis eŭtanaziigi nian familian katon pro tio, ke li rifuzis manĝi ion ajn, kion ni tiam povis trovi por li. Plej multaj el ni, kiuj preparis nin por ekzamenoj, provis ie fari ian bagatelan servon. Nia malgranda kampara Sesa Klaso estis bonkora gefrataro. Ni sciis, ke ni estas bonŝancaj; ni sciis pri la teruraj ebloj.

Je malpli grava nivelo, atendi ekzamenrezultojn estis streĉe. Mi atingis

Distingon en ĉiuj miaj studfakoj, kaj do akiris stipendion *County Major Scholarship* ... ne sufiĉis. Poste, iun matenon mi ekprenis tre malgajaspektan brunan koverton, kaj mia ekkrio venigis mian patron mal-supren. Mi opinias, ke inter ĉiuj timoj kaj streĉoj ankaŭ li havis momenton ekstazan.

Do ek al Somerville! Multaj pliaj dum-militaj limigoj, iuj servodevoj militrilataj, multaj malvarmaj lokoj, senlumeco kaj dubinda dieto ...

- neimagita libereco de parolo kaj diskuto
- neimagita kvalito de laboro
- torentoj da lumo al niaj studobjektoj
- diversaj mirindaĵoj de amikeco ...

Dum kelkaj jaroj mi dubis, ĉu vere estis vivo antaŭ Somerville. ■

La artikolo originale aperis anglalingve en *Somerville Magazine*, kaj tradukite en LBE 984.



Marjorie celebrata

NIA BRILA ESPERANTISTINO naskiĝis la 7-an de majo 1924. En tiu sama dato ĉijare kunvenis grupeto da homoj por partopreni ceremonion memore al ŝi precize centjarojn post ŝia naskiĝo. Partoprenantoj deklamis ŝiajn poemojn kaj laŭtleĝis diversajn prozaĵojn, plej ofte kun traduko en la angla.

Post kelkaj biografiaj detaloj oni aŭdis pri tio, kiel grava estis por Marjorie Kolegio Somerville. Laŭtleĝis fragmenton de ŝia artikolo *La vivo antaŭ Somerville* reprezentanto de la Kolegio, doktorino Jackie Watson; la tradukon prezentis Humphrey Tonkin. Sekvis diversaj poemoj de *Kontralte* (1955), *Cent Ĝojkantoj* (1957) kaj *Eroj* (1959): *Aliĝilo*, *Riĉo*, *Aglo*, *Dum Prelego*, kaj *Stranga Forto*.

Aliaj kontribuadoj estis ŝia traduko de

Preĝo sub la verda standardo, fragmento el ŝia biografio pri Zamenhof, kaj kelkaj linioj el *Dekdu Piedetoj*, montrantaj ŝian spritecon. Poste kontribuis neĉeestantoj: Nicola Ruggiero, reprezentante la Akademion Literaturan de Esperanto, sendis filmitan mesaĝon; mesaĝojn de Probal Dasgupta, prezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj Lee Miller, Direktoro de ĝia Sekcio por la Kontrolado de Lerniloj, oni laŭtleĝis; kaj fine Humphrey Tonkin, nome de Universala Esperanto-Asocio, parolis varme pri virino, kiun li ekkonis antaŭ proksimume 70 jaroj.

La ceremonio finiĝis per transdono de la plena poezia verkaro de Marjorie Boulton, *Unu animo homa*, al la bibliotekistino de Kolegio Somerville, Sarah Butler, kaj plie de la du ĵusaj reeldonoj de *Rimletero*. ■

▼ Gastojn atendas la ceremoniejo.



▼ Malverŝajna kunvenejo!



▼ La celebrato dum la 50-a Somerlernejo.



▼ Humphrey Tonkin



▼ Marteno McClelland



▼ Maurizio Giacometto



▼ Jackie Watson, Andrew Marshall




▼ Sally Phillips kaj Peter Bolwell



▼ Nicola Ruggiero (Akademio Literatura)



▼ Edmund Grimley Evans



▼ Terry kaj Anica Page



▼ Humphrey Tonkin (kaj ankaŭ fone!)



▼ Omaĝas somervilanon Jackie Watson



▼ Transdono de libroj





Omaĝe en Oksfordo

SENSURPRIZE, SENTIĜIS LA SPIRITO de Marjorie Boulton dum la 104-a Brita Kongreso, okazigita en Oksfordo de la 3-a ĝis la 5-a de majo. La evento komenciĝis ĉe Kolegio Somerville posttagmeze en la vendredo per teatraĵeto: Maurizio Giacometto kaj Malcolm Jones prezentis *Ne tute, nur duone*, verkita de Tiberio Madonna, skeĉon, kiu gajnis la unuan premion en la Belartaj Konkursoj en 2020. Surscenejiĝis por la lasta parto tria rolludanto, Gabriel Beacham. Sekvis leĝera kvizo, prezentita de Tim Owen, kaj bankedo en la kolegia Manĝohalo.

Por la semajnfino la ĉefa kongresejo estis la samstrata Kolegio St Anne's, kiu ofertis pli grandan ĉambregon, ol estis disponebla ĉe Somerville, kie, en tri ĉambretoj, okazis flankaj programeroj. En St Anne's estis metita en fokuson Marjorie Boulton. Humphrey Tonkin prezentis *Boulton, Shakespeare kaj aliaj geamikoj*, retrorigardante al la studperiodo, kiun li pasigis en Oksfordo en la 1970-aj jaroj, kiam li estis proksima najbaro de la karmemorulino. Tim Owen poste prezentis la vivojn kaj verkojn de Marjorie Boulton kaj Vilĉjo Auld, kaj la projekton Festjaro BAULDTON. Ĉe la fino li disdonis *novan* novan version de *Rimletero*: luksan kaj plenkoloran *specialan jubilean reeldonon*.

En la tria programero Maurizio Giacometto kaj Sally Phillips rolludis kiel Vilĉjo kaj Marjorie, deklamante kelkajn el la rimletero.

La programon finis Humphrey Tonkin per *50 jaroj de UEA: Bilanco*, kaj Stela Besenyei-Merger per verksesio, dum ĉe Somerville okazis fulmprelegetoj kaj debutanta sesio pri improvizado.

Dimanĉo komenciĝis per jarkunveno, en kiu nova konstitucio malplialtiganta la kvorumon estis akceptita de la membroj. Tri novaj estraranoj elektiĝis, kaj Clare Hunter, la sola restanto, fariĝis prezidanto.

Postlunĉe Jack Warren prelegis pri junulargastejoj, kaj Tim Owen, en kvazaŭa televidelsendo, intervjuis Humphrey Tonkin pri lia longega «kariero» en Esperantujo. La aranĝo finiĝis per la Slalomkonkurso de Maurizio Giacometto, kiu la sekvan tagon gvidis tranoktintajn interesatojn ĉirkaŭ la gastiga urbo.

Aliaj kontribuantoj estis Elizabeth Stanley kaj Roberto Garcia (kiuj okupiĝis pri novuloj), Jack Warren (*Ni muzikumu*), John Greenwood kaj Gabriel Beacham (progresantoj kaj fulmprelegetoj), Manuela Burghilea (improvizado, *Homlupo*), Stela Besenyei-Merger (pluraj legosalonoj), kaj Clare Hunter (kiu dum la tuta semajnfino funkciigis libroservon).

Aliĝis 62 esperantistoj al la kongreso. El tiuj ĉirkaŭ 15 revenis en mardo al Kolegio Somerville por ceremonio memore al Marjorie Boulton.

La kongreso estis je 18 aliĝintoj pli malgranda ol la antaŭa, okazinta en la tradicia rival-urbo Kembriĝo, sed kvalite same bona. ■

▼ Rolludas Maurizio Giacometto kaj Malcolm Jones. ▼



▲ Malnovaj geamikoj ĉe la bankedo

▼ «Vilĉjo» kaj «Marjorie»



▼ Improvizanto

▼ Provelsendo de nova televidserio!





Brita Kor ESPER

Oksf



Congreso de ORDO

Ordo

MIA INTERESIĜO pri improvizaj ludoj komenciĝis antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi malkovris en Jutubo la filmetojn de la grupo Barbixas (Muŝbarboj), danke al rekomendo de brazila amikino. La humurplena ludoj invitas la ludantojn al kremo, interago kun hazardaj ideoj de la publiko, kaj normaligo de absurdo. Ili estas registritaj en teatro de San-Paŭlo aŭ aliaj teatroj de Brazilo, kien la ludantoj estas foje invititaj, kaj poste estas alŝutitaj al Jutubo, kie ili ĝojigas ĉiusemajne la senpaciencajn spektantojn.

Freŝdate mi malkovris, ke Barbixas estis inspiritaj de pli malnova brita serio, nome *Whose Line Is It Anyway?* La serio originis en la okdekaj jaroj radie kaj televide, kaj poste transatlantikiĝis al Usono. Aperis en la serio famaj aktoroj kiel Colin Mochrie, Ryan Stiles, Josie Lawrence kaj Stephen Frost. Min ravis spekti la registraĵojn en Jutubo, kaj mi demandis min, ĉu oni iam provis fari ion similan en Esperanto, por amuziĝi kaj ridigi dum kongresoj. Bonŝance Tim Owen proponis spacon por la eksperimento en la ĉi-jara kongreso, kaj tiel lanĉiĝis Improvizo.

Por varbi pri la programero mi pri-skribis la ludojn en lumbildoj. La ludoj devis esti kiel eble plej facilaj por la unuafoja eksperimento. Tia ludo estis Demandoj, en kiu la ludantoj rajtis paroli nur per

Debutis en Oksfordo novspeca programero inspirita de malnova brita televidaĵo. Klarigas pri ĝi ĝia iniciatinto, **Manuela Burghilea**.



demandoj pri temo proponita de la spektantoj. Alia ludo estis Gazetara Konferenco, en kiu volontulo iĝis famulo kaj devis respondi la demandojn de la ĵurnalistoj, sen koni sian rolon kaj sian faritaĵon, sed provante malkovri tion per la demandoj. Ni multe moviĝis dum Staru, Sidu, Klinu, provante eviti ke du ludantoj estu samtempe en la sama pozicio. Fine, en Frazoj, la ludantoj improvizis scenon en kiun ili devis enmeti hazardajn frazojn skribitajn de aliulo kaj doni signifon al ili.

La du sesioj de Improvizo en Oksfordo estis laŭ mi sukcesa eksperimento, kiun mi kuraĝis reproponi por la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso en Litovio okazonta en aŭgusto, kaj kiun ankaŭ Peter Cleeves ludigis en la Skota Kongreso unu semajnon post la Brita. Mi aparte ĝojis pri tio, ke la ludadon en Oksfordo partoprenis ankaŭ kongresanoj kutime pli silentemaj. Defioj ekzistis pri la klarigado de kelkaj ludoj, kiujn oni plej facile komprenas spektante filmetojn de la brita serio anstataŭ aŭdante la regulojn. Cetere estis iom defie arigi ludantojn en la unua sesio, kiu samtempis kun ne unu, sed tri aliaj

kongresaj programeroj! Feliĉe la dua ĝuis pli da partoprenantoj, inkluzive de steluloj kiaj Stela Besenyei-Merger kaj Maurizio Giacometto.

Fine, Improvizo vekis ĉe kelkaj nostalgion. Mezaĝa kongresano, kies nomon mi ne memoras kaj kiu maltrafis la sesiojn, ricevis la novaĵon pri la okazigo de la ludoj kun granda, radianta rideto, en tiu fino de tago, en tiu fora trinkejo, memorante pri la spektado de *Whose Line?* infanaĝe kun sia familio. Pri tiu sento mi povas nur envii la britajn kongresanojn, kaj imagi kun kiom da avideco ili atendis la spektaklon antaŭ la televidilo. Ĉu same avide oni atendos Improvizon en Esperantujo? Mi pretas pensiigi pri Homlupo, se jes ... ■



▲ Maurizio Giacometto

▼ Mark Wootton kaj Liv Kaye, kun Marijus Banaitis fone



KUNVENIS EN DAVENTRY deko da Esperanto-instruistoj por semajnfina sesio gvidota de Katalin Kováts. Kunportis ŝi valizon da instruiloj: lernolibroj, kompreneble, plus ... absinto-kulero? Nuksrompilo? Grandaj kombiloj? Jes ja; la majstro de metodiko instruas per maniero maksimume memorinda. Kaj en tiu februara kunveno okazigita de EAB ŝia tasko estis stafete diskonigi siajn instruajn sciojn al invititoj.

Do, por kio kombilojn? Por instrui gramatikan koncepton al homoj, kiuj eĉ ne komprenas Esperanton! Kombileble! Per ili – kaj kelkaj viktimoj – ŝi lerte montris kiel instrui la refleksivon eĉ al homoj, kiuj ne regas Esperanton. Unu persono, laŭ peto de Katalin, ŝajnis kombi la hararon de sidanta samklasano: «Li kombas lin», klarigas ŝi kaj ripetas lernantoj. Poste kombiĝas virino. Rezultas de tio: «Li kombas ŝin.» Per interŝanĝoj eblas krei kombinojn de la plejmulto de la personaj pronomoj, kaj levi la interagojn al ŝtupo

pli alta: «Ĉu ŝi kombas lin? Ne, ŝi ne kombas lin. Ŝi kombas ilin.» Finfine kombilo-tenanto ordigas la proprajn hararon, kaj aŭdiĝas la klarigo: «Ŝi kombas sin.» Mesaĝo lerte enkapigita.

Metodoj malsimilaj

Jen gustumo de unu instrumentodo, la tiel nomata *rekta metodo* de la rumana pastro Andreo Cseh; alinome, la *Cseh-metodo*. Ĝin naskis la aparta situacio, ke la vaganta pastro devis lernigi Esperanton al homoj, kun kiuj li ne havis komunan lingvon. Lia metodo populariĝis: eĉ Lidja Zamenhof aliĝis al tiu aliro, veturante en Usono kun valizo da ludiloj kaj aliaĵoj, kiuj riskis konsterni doganistojn.

Tiu ne estas la unusola metodo por instrui lingvon, kaj dum la unua tago Katalin gvidis nin galope tra la historio de lingvoinstruado kaj ties teoriaj bazoj. Antaŭ la trejnado mi ne konsciis pri la ekzisto de tiom da instruebloj, ekzemple, de la metodo «sugestopedia» de la bulgara

psikologo Georgi Lozanov, kiu postulas, ke ĉiu lernanto rolas en iuspeca teatraĵeto prezentita en la cel-lingvo. Ĉe la mala ekstremo staras la tiel-nomata «armea» (sed oficiale «aŭdlingva») metodo, laŭ kiu la instruisto ekzercigas la lernantojn per longdaŭra ripetado de frazoj. Sufiĉas, laŭ la teo-



rio, scipovi nur kiel respondi al demandoj kaj asertoj; la signifon de vortoj kaj strukturon de frazoj oni ne klarigas. Iam populara en la kvindekaj jaroj, tiu lernosistemo sensurprize allogis kritikojn, kaj nuntempe apenaŭ plu estas uzata.

Konatiĝo

Tutunue en la sabato necesis komenci. Kiel fari tion en kursoj ne ĉiam estas evidente, kun homoj, kiuj ne jam konas unu la alian, kaj kiuj havas diversajn kapablojn, ĝis tiam ne konatajn al la instruisto. En tiu sama situacio troviĝis ni. Feliĉe Katalin traktis la problemon, petante al ni viciĝi laŭ nia Esperanta sperto. Tia ekzerco estas plurmaniere utila; ĝi tuj elseĝigas la lernantojn kaj necesigas, ke ĉiu parolu al ĉiu alia pri io preciza. Plie, nur per simpla aŭskultado la instruisto havigas al si informojn pri ĉies kapabloj kaj malfortoj. Reprezentigiĝis tuta gamo de sperto: kelkaj havis plurajn jardekojn, kaj aliaj komencis lerni dum la pandemio. Mi mem malkovris Esperanton per Duolingo, kaj, kiel kelkaj aliaj invititoj, instruas rete por la Londona Esperanto-Klubo.

Reta (mem)instruado

Tradiciaj ekzercoj de la klasĉambro estas malpli taŭgaj por reta instruado, kiu fariĝis la ĉefa lernmaniero en nia epoko. Abundas materialo: ekzemple, la instrumateriala sekcio de **edukado.net** jam disponigas centojn da senpage elŝuteblaj ekzercoj, enigmoj, ludoj, testoj kaj eĉ teatraĵetoj, serĉeblaj laŭ nivelo, lingvo kaj temo. Sed ĉu vi sciis pri la ekzisto de aliaj ret-rimedo krom Duolingo disponebligataj ekster Esperantujo? Plurajn malpli konatajn al ni enkondukis Katalin: **lernu.net**, Memrise, BabaDum, Drops, iTalki, uTalk, LearningApps, interalie. Ni eksciis pri la fortaj flankoj de ĉiu.

Simile nekonata – certe al mi, ekster tiuj de la serio *Teach Yourself* – estis la vasta gamo de lernolibroj pri Esperanto. Katalin kunportis amasegon, kaj prezentis kelkajn, klarigante punktojn bonajn kaj malbonajn. En tiu diskutado ni aktive partoprenis: ŝi petis, ke ni kunportu rimedon – ne nepre lernolibron, ĉar ekzistas korespondaj kursoj – kiun ni uzis kaj alte taksas, kaj alian nerekomendindan, kaj klarigu niajn elektojn.



Lernado per ludado


Evidentiĝis per tio, ke ni ĉiuj havis malsamajn lernofonojn, kaj sekve spertojn kaj kapablojn. Tiujn Katalin esploris pli detale (kaj esplorigis al ni) per peto, ke ni taksu nin per krado de la Komuna Eŭropa Referenc-kadro. Tio ebligas tajloradon laŭ la bezonoj de la lernantoj, kaj Katalin prezentis ampleksan gamon de ekzercoj, ludoj, ruzoj kaj instrumaterialoj, kiujn eblas uzi en diversaj situacioj.

Simpla ekzemplo de tiu tajlorado estas por komencantoj, kaj baziĝas sur la infanludo *Simon says*. Per ĝi oni kutimiĝas al la uzo imperativa de la u-finaĵo, kaj al la markado al rektaj objektoj. En la unua raŭndo parolas la instruisto, kaj reagas ŝi kaj la lernantoj: «Ni ekstaru!» Due, reagas nur la studentoj, sen helpago de la instruisto. Trie, simoniĝas studento, elbuŝigante ordonojn al la instruisto, kiu reagas laŭe. Kaj kvare, lernanto petas, ekzemple, «Tuŝu la nazon», kaj reagas la kunlernantoj. Ludo tre simpla, sed kiu donas kvar-stadian lern-procedon: kopiadon, komprenadon, produktadon, kaj sendependiĝon. La gramatikon oni ne

devis instrui: ĝi ŝtele enŝoviĝas per ludado.

Britdevenaj legantoj al mi similaĝaj eble memoras la televidan programon *Nightmare*, en kiu infano, blindigita per kaskego, estis gvidata ĉirkaŭ sinsekvo de objektoj kaj malamikoj, helpate de siaj samteamanoj, kiuj spektas la progreson de la aventuristo surekrane. «Turnu vin maldekstren, kaj paŝu trifoje antaŭen ... ne, via alia maldekstro!» Kutime estis tiel, ke la kaskportanto baldaŭ falis en abismon, aŭ estis trompita de troentuziasma aktoro en mezepokaj vestaĵoj. Per simila rimedo eblas instrui pri la direkto-vortoj, eĉ manke de lafoplenaj abismoj kaj korna kasko; nur klasĉambrajn seĝojn kaj tablojn oni bezonas por krei obstaklokurejon.

Mankas tia interkomunikado en la reta sistemo, kaj Katalin, substrekinde la gravecon de la socia etoso, donis al ni ideojn por plivivigi la interagojn inter partoprenantoj. Dum mia provado konvinki amikon aĉeti elegantan kuleron mi ofte stumblis, kaj serĉitaj vortoj tuj malaperis el la kapo ... sed ĉiuj amuziĝis, kaj tio estas ŝlosila por lernado.



Finaj konsiloj

Komuna trajto ĉe la metodo-proponintoj ŝajne estas kredi, ke ilia sistemo propre elpensa estas la sola instruinda. Danke al la gvidado de Katalin, ni konstatis, ke anstataŭ kaptiĝi pro fideleco al aparta kadro inter la aliaj, oni prefere koncentriĝu pri tio, kio efektive bone funkcias en la reala aŭ virtuala klasĉambro. Aliro sukcesinta ĉe unu grupo povus fiaski ĉe alia.

Katalin plie konsilis al ni, ke eĉ plen-kreskulo povas koncentriĝi pri aparta afero dum maksimume nur dek minutoj. Poste la menso ekvagis, kaj tial utilas nek prelegi al viaj lernantoj dum la tuta instru-periodo, nek ĉiusemajne igi ilin plenumi la samspecajn ekzercojn. Teditoj rapide mal-aperos! Pli bone estas vigligi la lecionojn kaj surprizi ilin, kaj ili poste preskaŭ certe antaŭĝuos la venontan sesion. Por mi, tio estas la plej profunda leciono de semajnfino tute partopreninda. Ni adiaŭis, plenaj de nova entuziasmo, kaj pretaj uzi niajn majstre pliakrigitajn sciojn.

Krome en la reto


Baldaŭ poste ni ricevis sciigon, ke mal-graŭ la tre intensa semajnfino ĵus pasigita, Katalin ne havis tempon fari ĉion, kion ŝi antaŭvidis. Ŝi do proponis plian sesion, ĉi-foje okazigotan en la reto.

Ne ĉiuj estis disponeblaj, sed ĝin partoprenis ses el la originalaj invititoj: ja sufiĉe por interesa sesio, en kiu ni prezentis niajn personajn lecionojn por pri-komentado de niaj kamaradoj. Estis interese povi vidi la diversajn alirojn, kiujn havis la aliaj instruistoj, kaj lerni ĉiu de la aliaj.

Temas entute pri trejnado kleriga kaj absolute partopreninda, en kiu multon lernis ĉiu invitito. ■

Tri el la invititoj al la instruista trejnado
– John Greenwood, Roberto Garcia kaj
James Hawkey – baldaŭ poste debute
intruis por EAB en la Studa Semajnfino,
kiu okazis en Edgbaston en aprilo.

▼ Partoprenantoj de la kroma sesio, okazigita en la reto.



Por sia projekto Festjaro BAULDTON, t.e. la festaj prisolenaĵoj omaĝe al la centjara naskiĝa datreveno de du eminentaj esperantaj poetoj, la anglino Marjorie Boulton (1924–2017) kaj la skoto William Auld (1924–2006), Esperanto-Asocio de Britio eldonis du malsamformatajn librojn de la famaj *Rimleteroj* aŭtoritaj de ĉi poetoj: la iom luksan kun eĉ koloraj fotoj *Specialan Jubilean Reeldonon*, kaj la poŝtkart-grande pli modestan *Jubilean Reeldonon*, ambaŭ lerte kaj sperte redaktitajn kaj editoritajn de Tim Owen. En la speciala reeldono aperas ankaŭ pluraj fotoj de la originalaj poŝtkartoj kun la rondel-tekstoj. Temas pri la sola komuna verko, estiĝinta tre frue, komence de ilia poeziverka vivitinero, kiam ambaŭ estis ankoraŭ ne tridekjaraj. La tuta korespondado, skribita per rondeloj sur 84 poŝtkartoj, disvolviĝis dum la daŭro de preskaŭ ok monatoj, inter 1953.09.27 kaj 1954.05.08. Longe la verketo ne aperis, tiam verŝajne nur malmultaj havis scion pri tiuj juvelaj poeziformaj korespondaĵoj senditaj de Auld al Boulton, al ŝiaj diversaj adresoj, kaj de la poetino reciprokitaĵ dum tiu okmonata periodo.

Facilis la decido por EAB elekti tiun

verketon por komune prifesti ĉi eminentajn jubileulojn: fakte ĝi estas korespondaĵo, kiu unuafoje aperis libroforme nur en la jaro 1976, eldonita de Esperantaj Kajeroj en Manĉestro, Anglujo.

Tintantaj perloj

Mi konfesas, ke tiam mi la libron ne legis, kvankam de poezio daŭre allogate, mi estis tiam ankoraŭ juna homo engaĝita en pli necesaj kaj praktikaj vivbataloj, pro kiuj mi devis ofte rezigni pri legindaj libroj stimulantaj miajn mensajn interesojn. Sed mi legis disajn, laŭdajn priajn recenzojn, kiuj akiris mian deziron iam tralegi ĉi unikan korespondaĵon. Ankaŭ por mi venis la tago de mia legoĝuo: en la jaro 1987 aperis la festlibro honore al William Auld, *En barko senpilota'*, la ĝis tiam tuta poezia verkaro de la skoto,

bonŝance entenanta la kompletan tekston de *Rimleteroj*, kiujn mi povis mire kaj admire re- kaj relegi ĝissate.

Estis por mi legosperto unika, la malkovro de ĉi tintantaj perloj de pura esperanta poezio teksita sur la rigide fiksfirma franc-devena rondelo, kie sonludas nur du rimoj kaj skeme same



1 Eldonis Edistudio en Pizo, Italujo.

reaperas la du unuaj versoj, por ĉenlige substreki la enhavan ĉeftemon. La du poetoj, eĉ sub ĉi rigore teknikaj rondelaj verkobridoj, kapablis talente sin esprimi konstante je alta poezia artnivelo, malbanale kaj kreive, eĉ ĉe plej simpla argumento, kvankam maloftas simpla argumentado ĉe ilia rimeferveska korespondado. Tiam, kaj plu hodiaŭ, denove relegante *Rimleterojn*, mi restis impresita, ke tioma poezi-esprima inventemo kaj vortoteksa kapablo, ĉe ambaŭ aŭtoroj, entire sorĉas la leganton en rezonadojn nete klarajn, sed arte prezentitajn.

La arta poezia valoro de ĉi verketo estas por mi nepridubinda, spite kelkajn malajn opiniojn de pli doktaj literaturkritikistoj kun kiuj mi ne ĉiam samopinias. La hungaro Vilmos Beniczik, en sia pozitiva kaj laŭda recenzo de la jaro 1977, tamen konkludas per aserto iom senrevige reduktiva, ke «... ĝue legos ĝin eĉ personoj, kiuj ne volonte rompas al si la kapon per digestado de nia komplika moderna liriko.» Malas mia opinio: certe agrablos la legado, sed legos volonte tiuj, kiuj emas mense koncentriĝi je la enhavo kaj ĝue ensorbi pense poezivibrajn nuancojn esprimivajn, kio elstreĉas la atenton kaj klopodigas la komprenon! Plie, la sudafrika poeto Edwin de Kock, en

la jam citita festlibro *En barko senpilota*, asertas en sia uvertura eseo samlibre, ke ĉi poezia korespondado «... certe ne estas granda poezio. Tio prezentas la mikrostilan heredaĵon el la Parnasismo. Ni rimarkas en tio, ke nek la sentumoj nek la emocioj ludas menciindan rolon. Ankaŭ la metaforigo ne multe evidentas, krom ĉe la lasta verso...» Ĉu vere tiel? Ĉu vere nur ia stilekzerca, rimabunda, redunda ripetado de fiksformaj verskliŝoj fride eldiritaj por elmontri lerton en sia poeta metieco?

Laborfekundo

Mi nutras firman konvinkon pri la malo: niaj du poetoj kapablas nuanc-riĉe esprimi multon, eĉ seriozan argumentadon per la dektri-versa koncizo rondela – efektive, laŭ komunika vidpunkto, nur dek versoj en ĉiu rondelo peras

mesaĝon, ĉar tri versoj ĉenlige ripetigas – kaj la emocivibra inventemo vorta ofte altflugas ĝis vertoj de poezia virtuozezo, mesaĝante al ni diversaĵojn plej ĉuigajn, de ideoj mondrigardaj, al stato postmorta, al homaj pekemo kaj religio, de sekso kaj infana edukado al poeteco kaj verkemo, ktp. Indas mencie substreki, ke ĉi korespondadon ambaŭ poetoj akuŝis junaĝe, kiam ili estis ankaŭ intense engaĝitaj produkti la plejbonon de sia poezia



kreado. Tiam Auld ĵus publikigis sian unuan poemaron en *Kvaropo* (1952) kaj certe li estis samtempe verkanta versojn poste aperintajn en *Unufingraj melodioj* (1960) kaj nedubeble skizanta planojn por kree efektiviĝi sian majstroverkon, *La infana raso* (1956): do laborfekunda periodo sur la poetika kampo.


Boulton same laboregis poezikreive je frenezaj ritmoj, produktinte dum tiuj jaroj elstare artismajn poemarojn apenaŭ imageblajn, eĉ se, bedaŭrinde, tiam ne publikigitajn kaj diskonigatajn. Ŝi debutis antaŭ la esperantlingva publiko per sia altkvalita poemaro *Kontralte* en la jaro 1955, samtempe akuŝante, en la jaroj 1953 kaj 1954, du el siaj plej bonaj poeziverkoj, se ne entute kaj absolute siajn pintajn ĉefverkojn en ŝia vasta poezia panoramo. Temas pri *Nuntempa eposo* (1953), kiun la poetino mem konsideris sian «plej bona frua verko» kaj pri kies publikigo ŝi dumvive rezignis, pro promeso donita al sia plej kara amikino kaj «korfratino», la kroata Vlasta Uršić (1922–2014), sur kies vivdramo la tuta poemaro baziĝas, publikigita nur posteume en la jaro 2022 en *Unu animo homa*, la tuta poezia verkaro de Boulton. La alia tiutempa (1954) verkita, gravega poemaro ne-

eldonita, aŭ nur tre malfrue duonkaŝe aperigita sen ŝia rekta konsento, estas *La sekreta psiko*, erotika sonetaro vers-arte pintvalora, ankaŭ nur aperigita post ŝia morto, en ŝia kompleta duvoluma verkaro.

Motivoj

Indas reveni pli faktece kaj iom pli analize al *Rimleteroj* mem, por klopodi trokompreni la kialojn kaj kielojn de tiu unika korespondada rilato inter ĉi aŭtoroj. Kiu estas la kialo, kiu subite ekfajrigis, en la eferveske poeziŝaŭmanta menso de la juna Vilĉjo, bardo malkvieta kaj pense generobezona, la stimulan neceson proponi korespondadon per la rigida skemokaĝo strofa kaj rima de mezepoka franca rondelo, iu poeziformo arkaiginta kaj maltaŭga esprimi modernajn dudekjarcentajn sent- kaj pens-elverŝojn?

Ĉu la bezono-deziro pruvi, per ĉi malfacila, antikva strofeskemo (kvankam la ĉefpastra bardo Kolomano Kalocsay samtempe jam atestis ĝian sukceson en Esperantujo), ke li kapablas forĝi kaj modli eĉ plej malmolajn metalojn kaj enĉizi plej durajn diamantajn ŝtonojn je la servo de poetiko soranta al plej altaj ĉielsferoj? Ĉu do, praviginte kritikon far de Kock, pruvi sian poezian lerton metiecan, manke de pli adekvata talento kreipova? Malfacilaj




demandoj apenaŭ respondeblaj per ne-kontesteblaj asertoj konvinke rofirmaj: ĉar poezio estas diafana diino nekaptebla per niaj homaj impresoj, sentumoj kaj tre personaj intimaj taksokapabloj.

Impresa mastrumado

En la jaro 1953, Marjorie kaj Vilĉjo estis junaj, talentaj, verk-emaj, poeziemaj kaj ŝpruce kreivaj sur pluraj literaturaj kampoj en la esperanta mondo, do estis nature kaj logike, ĉe ambaŭ, sin ĵeti en intelektan skermadon per la rondelarmilo, unu el la plej mal-facile manipuleblaj skermiloj pensokreaĵ

kaj vortesprimaj. Kaj tion ili mirinde mastrumis je plej efike impresa artnivelo, pruvante refoje kaj denove, ke kristalklare diamantas, dum tiu feliĉa korespond-periodo, iliaj ambaŭaj naturdonitaj verk-istaj genioj. ■



Nicolino Rossi esperant-istiĝis en 1962. Li estas konata verkisto kaj recenzisto, kaj multfoja laŭreato en diversaj konkursoj pro siaj poeziaj verkoj. En 2024 aperis *La arto verki kaj traduki*, liaj tradukoj de rakontoj kaj poemoj de pluraj italaj aŭtoroj.

La jubilean reeldono de *Rimleteroj*, eldonitan de EAB, eblas aĉeti de Amazon kaj aliaj tiaj retbutikoj.

▼ La jubilea reeldono apud la du pli fruaj eldonoj de 1976 kaj 1986.



En 1931, sub la aŭspicio de Literatura Mondo, aperis, per la plumo de «La poeto de la poetoj», Kalomano Kalocsay, en la dekjara jubileo de lia elektra debuto sur la literaturan scenejon Esperantan, *Rimportretoj*: juvelo, per kiu li arte verkis tri-butojn al siaj samepokanoj. La kajero mem estis leĝera, nur dek centimetrojn larĝa, dek kvar alta, kaj unu dika; oni ĉi-kaze ne taksu, tamen, potencon laŭ aspekto. Por ĉiu komentito en la libro Kalocsay verkis rondelon: t.e. mezepoka poemstilo franca, laŭ formo de 13 versoj laŭ du rimoj. La skemo fariĝas ABba-abAB-abba-A, kun deviga ripeto de la unuaj du versoj (AB) fine de la dua strofo, kaj de la unua fine de la tria. En A aperas la nomo de la subjekto, kutime nur la famili-nomo, tamen foje kares- aŭ kaŝ-forme. Malofte oni legas la plenan nomon. Jen ilustra ekzemplo pri la anglo Karl Minor, unika inter la rimportretitoj pro tio, ke li kaj Kalocsay malpaciĝis, kaj tial Kalocsay ne laŭdis, sed primokis la «celebraton»:

XXXVI

Karl Minor – mortas por Logiko (A)

Eĉ en plej eta sencnuanco. (B)

Nin iam pro la asonanco (b)

Disigis akra polemiko. (a)

Kvankam mem emis li por piko, (a)

Indignis li pri mia lanco. (b)

Karl Minor – mortas por Logiko (A)

Eĉ en plej eta sencnuanco. (B)

Kvankam *Rimletoj* povus pensigi alie, ne **William Auld** kaj **Marjorie Boulton** enkondukis rondelojn en la Esperantan literaturon. Jen analizo de *Rimportretoj*.

Ni laŭdu lin pri stilistiko, (a)

Pri Natan¹. Ŝerci estas ŝanco, (b)

Sed ĝenas min la cirkonstanco: (b)

Li estas mia malamiko. (a)

Karl Minor – mortas por Logiko (A)

Nombri la ricevintojn de la rimportretoj ne estas facile, malgraŭ tio, ke ĉiu portas sinsekvajn sonet-numeron. La dek-tria estis dediĉita al neniuj, pro superstiĉo, ekzemple; du homoj – Felikso kaj Leono Zamenhof – estas la subjektoj de la 56-a; kaj al la sama homo estas dediĉitaj la 44-a kaj la 51-a. Ĉu povas esti, ke Kalocsay ne en tiu momento sciis, ke Kenelm Robinson kaj K. R. C. Sturmer («la Timata», pro lia akra recenzo-stilo) estas la sama homo? La 58-a – kaj lasta – fakte estas *tri* rondeloj: unu de Kalocsay pri si, kaj du pri li verkitaj de Lajos Tárkony (LIII) kaj Gaston Waringhien (LIV).

Rimportretoj ne nur estas facile legebla fenestro al la pensoj de Kalocsay pri siaj samepokanoj, provizante per informoj klerigaj al ni posteuloj. Ĝi, kun alia samjara samaŭtoraĵo, markis grandan

¹ Aludo al *Natan la Saĝulo*, traduko de Minor en 1923 el germana *Nathan der Weise* de Gotthold Ephraim Lessing.

progreson de la Esperanta poezi-arto ĝis nacilingva nivelo. Laŭ William Auld: «Dank' al [Kalocsay], oni povas diri, ke jam en 1931 (*Streĉita kordo*, *Rimportretoj*) la esperanta poezio estis teĥnike egala al ĉiuj naci-lingvaj. Ĉio estis ne nur ebla, sed pruvite ebla.»² En *Esperanto* resumis ĝin Georges Stroele (L: *Stroele*, el recenzista gildo), kiel: «Plaĉa albumeto, kun sesdeko da fotoj montrantaj la plej konatajn nunajn Esperantistojn, verkistojn, vortaristojn, administrantojn, recenzistojn, kaj pri ĉiu el ili la poeto verkis laŭdan aŭ informan, aŭ moketan rondelforman poemeton.»

La elekto de steluloj estas, kompreneble, tre interesa, aparte por ni posteuloj, kiujn la sorto regalas per la postvido. Ne mankas, nature, kolegoj ĉe *Literatura Mondo*, ĉu renomaj nomoj, kiel Ferenc Szilágyi³ (LII: *Szilágyi* – la maljuna avo), ĝia kunredaktoro Lajos Tárkony⁴ (LIII: *Lajos Totsche*, vizaĝo lakta) kaj Julio Baghy⁵ (I: *Julio Baghy*, homo homa), ĉu

aliaj ĝenerale perditaj en la forgeso, kiel Miloš Lukáš⁶ (XXXII: *Miloš Lukáš* – la violeto), kiu tradukis multon el la ĉeĥa kaj slovaka⁷, kaj de Baghy, Kalocsay, ktp etnolingven, Alessandro Mazzolini (XXXIII: *Mazzolini*, la sfinks' ermita), kunredaktoro de ok diversaj gazetoj, Leonard Nowell Mansell Newell (XXXIX: *Newell* – bel-kulto, vers-aklamo), kiu poste verkis la originalan novelaron *Bakŝiŝ*, kaj Pál Balkányi (II: *Balkányi*'n, la Nurhomon Veran), kiu donis al *LM* ĝian nomon⁸.

Ne nur al kolego-verkistoj ĉe *Literatura Mondo* li limiĝis: Hendrik Bulthuis (XI: *Bulthuis* – la edzo de l' romano) verkis tri novelojn en la dudekaj jaroj⁹, Friedrich

2 Citaĵo el *Nia Diligenta Kolegaro*, kaj eltiraĵo el pli longa citaĵo trovebla ĉe sezonoj.ru/2019/10/blk-7/.

3 Romanisto (*La granda aventuro*; *Mistero minor*), kiu transloĝiĝis al Svedujo kaj tie fondis *Norda Prismo*.

4 Laŭ Kalocsay «lirikisto», kies poemoj aperis en *Literatura Mondo*, la nica literatura revuo, *Norda Prismo* kaj *Hungara Vivo*. Li unue verkis sub la germanigo Totsche.


5 La poeto de la popolo, kiu ne bezonas propran piednoton, ĉar liajn kontribuojn post la samtempa debuto kun Kalocsay ĉiuj jam konas.

6 Rimarkinde, ĉar li estis unue idisto, kaj ŝanĝis mallonge poste al Esperanto!

7 Laŭraporte, pli ol 160 ĉeĥajn kaj 15 slovakajn poemojn, kaj preskaŭ 100 ĉeĥajn kaj 4 slovakajn prozaĵojn.

8 Tre grave: li debutigis Kalocsay en 1921, publikigante lian unuan libron, *Mondo kaj Koro*.

9 *Idoj de Orfeo* en 1923, *Jozef kaj la Edzino de Potifar* en 1926, kaj *La Vila Mano* en 1928.



Ellersiek (VIII: *Ellersiek* – la «Praktikon» gvidas), sub la kaŝnomo Argus verkis la unuan krimromanon, la nefinlegeblan *Pro Kio?*, kaj Johannes Dietterle (XV: *Dietterle*, kara profesoro) servis elstare al la esperantistaro per sia *Originala Verkaro* de Zamenhof¹⁰.

La celebratoj ne estis nur literaturistoj, tamen: troviĝas en la libro pintaj kontribuintoj per aliaj rimedoj: Andreo Cseh (XIV: *Andreo Ĉe*, la Gaja Stelo), la fenomenaj instruistoj, kiu, kun Julia Isbrücker (XXIV: *Julia Isbrücker* – senlaca), fondis la nunan Internacian Esperanto-Instituton en 1930 kaj, en 1942, la Universalan Ligon, kreinton de la monspoko *Stelo*. Teo Jung (XXVI: *Jen Teo Jung* – la Fluga Famo) fondis la unuan ĉiusemajnan ĵurnalon, *Esperanton Triumfontan*, poste *Heroldon de Esperanto*, kiun li redaktis ĝis 1961 ... kiam li troviĝis ĉe la malĝusta flanko de la akra disputego ata-ita¹¹.

10 La unua kaj sola tiaĵo, ĝis la du volumaj *Leteroj de Zamenhof* de Waringhien kaj la 58(!)-voluma plena verkaro *zamenhofa* de Ludovikito.

11 Ĉu neniu pensis nomi tion *bitalo* aŭ *milato*?

La postvido donas al ni informojn, kiujn ne disponis la celebrinto, verkante en 1931. Elstaris al miaj okuloj, ke 13 el la laŭdatoj mortis ene de dek jaroj post la publikigo, la vortaristo kaj prezidanto de la Akademio Théophile Cart (VII: «Ni fosu nian sulkon, frato») en la sama jaro, kaj ke preskaŭ duono el ili malaperis ene de du jardekoj, kelkaj (Lidja Zamenhof (LVII: *Lidja Zamenhof*, kor' fervora) en 1942, Ernest Drezen (XVII: *Drezen*, la ruĝa-verda car'')) eĉ murditaj de Hitler kaj respektive Stalin.

Antaŭ aliaj tamen atendis longa vivo, kaj tio rimarkigas alian aferon: ke Kalo-csay aldonis ilin, sen ajna scio, ke iliaj kontribuoj estontaj nanigos tiujn, pro kiuj li celebris lin. Plej elstara ĉi-rilate estas Gaston Waringhien (LIV: *Waringhien* – vortsencojn fiksas), kies foto montras lin eĉ harhavan; li laboris kun Emile Grosjean-Maupin¹² (XXII: *Grosjean[tiel]-Maupin* – la Vortministro), Albert Esselin kaj Salomon Grenkamp-Kornfeld¹³ (XXI: *Salo Grenkamp* – la KORO KRIA) por kunredakti la *Plenan Vortaron* en 1930, jam grandega atingo: sed tion li superis pro sia ĉef-

12 Kompilinto, kun Waringhien, de la *Plena Vortaro de Esperanto* en 1930, antaŭulo de nia ilustrita aŭtoritataĵo unuafoje aperinta en 1970, kies ĉefredaktoro estis Waringhien.

13 «Salo» estis aparte talenta parolanto, kaj plurfoje premiĝis en Universalaj Kongresoj pro siaj kapabloj oratoraj kaj deklamaj.



redaktado de *Plena Ilustrita Vortaro* en 1970, rekorda 65-jara deĵorado en la Akademio de Esperanto, kunaŭtoreco de *Plena Analiza Gramatiko* kaj *Parnasa Gvidlibro ...* Pri Edmond Privat (XLII: *Edmond Privat* – la dolĉa Vorto), li tamen eble havis ideon pri brila estonteco: la junulo jam verkis sian hagiografion *La Vivo de Zamenhof*, la unuan biografion pri la iniciatinto de la lingvo, la du-partan *Historio de la lingvo Esperanto*, la dramon *Ginevra*, kaj porparolis la movadon ĉe la Ligo de Nacioj.

Simile pensigas Raymond Schwartz (XLVII: Jen *Raymond Schwartz*, kun vinbotelo), kiu en tiu epoko ja starigis sian kabaredon *Verda Kato* kaj freŝe aŭtoris *La stranga butiko*, sed kies plej elstaraj verkoj venis poste¹⁴: multe pli da kalem-buroj atendis la tiamajn legantojn! Kaj kortuŝe estas lia alvoko al la sola listigito ne plu aktiva: (XXVII: Ho, *Kabe, Kabe, Kabe, Kabe*); li ne povis scii, ke Jean Forge (XIX: *Jean Forge* – Tekniko kaj Rapid') retrovos la malaperinton en 1956, intervjuante lin en *Pola Esperantisto*.

Ne ĉies estontecoj estis tamen brilaj. Aparte saltas el la libreto Hans Jakob (XXV: *Hans Jakob* – mastro de UEA), kiu fariĝis estro de la Centra Oficejo en 1920 kaj ĝia Ĝenerala Direktoro en 1924, sed kiu samjare proteste demisiis, kaj poste helpis iniciati juran proceson por malhelpi la translokiĝon de la CO al Londono. Post la sekva skismo, li fariĝis ĉefo de la ĝeneva

UEA. La arĥivoj de UEA montras, ke Eduard Stettler kaj Jakob interŝanĝis antisemitismajn mesaĝojn (Stettler, pli aĝa, la korifeo kaj Jakob la papago). Post lia morto evidentiĝis, ke Jakob ŝtelis monon de UEA; parto de lia heredaĵo devis estis transdonita al lia iama dungito.



La rimportretitoj estas vera kolekto de *Kiu kiuas* el la jaroj de la dua periodo de la Esperanta Literaturo, el kiuj multaj transiris en aliajn. Eble evidentaĵo de fekundeco, lanĉita de la arĝenta duopo en Buda-peŝto, ĉar neeviteble venas en la kapon la penso: ĉu eĉ eblus fari ion tian hodiaŭ? Kalocsay aplombe sukcesis; kompili tian listegon en la nuntempo, tamen, ne ŝajnas tre probable. ■

Bibliografio

Boulton, Marjorie (2022): *Una animo homa*; Esperanto-Asocio de Britio.

Gorecka, Halina; Korĵenkov, Aleksander (2018): *Nia Diligenta Kolegaro*, Biografio de 200 eminentaj esperantistoj; Sezonoj/Litova Esperanto-Asocio.

Kalocsay, Kolomano (1931): *Rimportretoj, Galerio de Esperantaj steloj*; Literatura Mondo.

Minnaja, Carlo; Silfer, Giorgio (2015): *Historio de la esperanta literaturo*; LF-koop.

Sutton, Geoffrey (2008): *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*; Mondial.

Ŝirjaev, Ivan; kaj aliaj (1933): *Enciklopedio de Esperanto*; Literatura Mondo. Vikipedio

14 Plej elstare: la romano *Kiel akvo de l' rivero* (1963), ... *kun siaspeca spico!* (1971), kaj novelaro *Vole ... novele* (1971).

Kongresa kvizo 2024

En la unua vespero de la kongreso en Oksfordo okazis la kutima leĝera kvizo, per kiu eblas amasigi donac-monon kontraŭ poentoj. Ĉi-jare la mono iris al la premio Maertens de UEA, ĉiujare aljuĝota al instancoj aŭ individuoj, kiuj grave kontribuis al la evoluigo de la Esperanto-movado.

Kiel kutime la demandoj ĝenerale rilatis al jubileoj, la kongres-urbo, kaj okazitaĵoj en Esperantujo inter Britaj Kongresoj.

1

En kiu urbo okazis la
Universala Kongreso en 1930?

- ▶ Londono
- ▶ Kemбриĝo
- ▶ Oksfordo

2

Kiu studis ĉe Kolegio
Somerville, Oksfordo?

- ▶ Marjorie Boulton
- ▶ Elizabeth Stanley
- ▶ Humphrey Tonkin

3

Kiu studis ĉe Kolegio St
Anne's, Oksfordo?

- ▶ Marjorie Boulton
- ▶ Elizabeth Stanley
- ▶ Humphrey Tonkin

4

Kiu skribis, antaŭ la Brita
Kongreso en Oksfordo
en 1933, ke oni «fidele
subtenu Esperanton»?

4

- ▶ Tinĉjo (Tintin)
- ▶ J.R.R. Tolkien
- ▶ H.R. Tonkin

5

Kiun Ŝekspiraĵon tradukis Marjorie
Boulton kaj Humphrey Tonkin?

- ▶ Kanelonon
- ▶ Koriolanon
- ▶ Karaokeon

6

Al kiu junulo la BEA komisiis la
taskon starigi junularan filion?

- ▶ John Francis
- ▶ Humphrey Tonkin
- ▶ Marjorie Boulton

7

Kiu est(i/o)s la unua
prezidantino de EAB?

- ▶ Clare Hunter
- ▶ Marjorie Boulton
- ▶ Manjo Austin

8

En kiu jaro Edmund Grimley Evans estraraniĝis en EAB?

- ▶ 1997
- ▶ 1998
- ▶ 1999

9

Kiel Humphrey Tonkin fariĝis Prezidanto de UEA en 1974?

- ▶ Per komunista puĉo.
- ▶ Per retiriĝo de la alia kandidato.
- ▶ Per balota interferado.

10

Laŭ afiŝo en Truth Social necesas por la bonfarto de «malsukcesanta» Usono debato inter «Koruptemulo» Joe Biden kaj:

- ▶ Ivo Lapenna
- ▶ «Honestaj» Donĉjo
- ▶ «Idioto» Hamfreo

10

11

Kiu estis Prezidanto de UEA inter la du deĵor-periodoj de Humphrey Tonkin?

- ▶ John Wells
- ▶ Ivo Lapenna
- ▶ Grégoire Maertens

12

Kiu longharulo lastatempe pretendis esti la Prezidanto de UEA en la deĵorperiodo de Kep Enderby?

12

- ▶ Manuela Burghilea
- ▶ Leonardo Popov
- ▶ Tim Owen

13

En 2023 la Akademio de Esperanto anoncis sian kioman Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro?

13

- ▶ 10-an
- ▶ 20-an
- ▶ 30-an

14

En 2023 la Akademio de Esperanto deklaris sian opinion:

- ▶ Pri la litero ŭ.
- ▶ Pri genro-neŭtralaj pronomoj.
- ▶ Ke Akademianigi Tim Owen estis granda eraro.

15

Antaŭ duonjarcento la Akademio de Esperanto:

15

- Forigis sian antaŭan malrekomenon de la sufikso **-i-** en **landonomoj**.
- Aprobis la uzon de la **h-sistemo** por anstataŭigi supersignojn.
- Anoncis la **x-sistemon** nekontraŭa al la Fundamento.

16

Ĝis hodiaŭ aliĝis 441 al la Universala Kongreso en Tanzanio. Ĝi verŝajne prenos la malrekordon pri postmilitaj UK-oj de kiu urbo?

16

- Bjalistoko (1959)
- Roterdamo (2008)
- Bonaero (2014)

17

Kiom el la aliĝintoj al la UK en Tanzanio loĝas en Afriko?

- ~10%
- ~20%
- ~25%

18

Se «Rusoj loĝas en Rusujo», ĉu oni rajtas uzi apud *Tanzanio* la formon *Tanzanujo*?

- Jes: tio estas Fundamenta formo
- Ne

19

Kiu libro rezultis de poezia korespondado inter William Auld kaj Marjorie Boulton?

- Rimletero
- Rimliteroj
- Rimlitroj

20

Kiun teatraĵon tradukitan de William Auld oni okazigis ĉe Teatro Bloomsbury por la jubileo de Esperanto?

20

- La graveco de la fivortoj.
- La graveco de la fideleco.
- La graveco de la Fundamento.

Respondojn trovu en la sekva paĝo!


Respondoj: **1** Oksfordo **2** Marjorie Boulton **3** Elizabeth Stanley, kiu pasigis tempon kun novuloj en la sabato, studis ĉe St Anne's College, nia ĉefa kongresejo. **4** J.R.R. Tolkien skribis sian alvokon en *La Brita Esperantisto*. Propagandistoj ial ne menciis, ke li poste distanciĝis de Esperanto. **5** Marjorie Boulton postlasis nefinitan tradukon de *Koriolano*. Humphrey Tonkin redaktis kaj kompletigis ĝin, kaj EAB ĝin eldonis en 2023. **6** Nia invitito Humphrey Tonkin ricevis la taskon krei sekcion de la Brita Esperanto-Asocio por junuloj. La rezulto estis Junularo Esperantista Brita. **7** Manjo Austin estis prezidantino de EAB de 1981 ĝis 1988. **8** 1997 **9** Sciante, ke li ne venkos, Ivo Lapenna retiriĝis, lasante nur unu kandidaton. **10** Kredu-ne-kredu: Trump donis al si la kromnomon *Honest Don*! **11** Grégoire

Maertens prezidis de 1980 ĝis 1986. **12** Iu eksa volontulo por TEJO, Leonardo Popov, anstataŭigis la foton de Kep Enderby sur la muro de prezidintoj en la Centra Oficejo per unu de si. **13** Nur la 10-an, per kiu ĝi oficialigis 420 radikojn. La 9-a eldoniĝis en 2007. **14** Pri la litero ŝ. **15** Kvankam ĝi ne oficialigis la sufikson -i- uzatan por landonomoj, la Akademio forigis sian antaŭan malrekomendon. **16** Bjalistoko kaj Roterdamo gastigis sukcesajn jubileajn kongresojn. Al la kongreso okazigita en Bonaero aliĝis 706 homoj, malpli ol al ĉiu alia postmilita. **17** En tiu tago nur 10% de aliĝintoj al la kongreso estis afrikanoj. **18** Ne: la radiko estas Tanzani/. La litero *i* estas parto de la nomo, ne sufikso. **19** *Rimleteroj*. Kongresanoj ricevis specialan jubilean reeldonon. **20** Temas pri prezento de *La graveco de la fideleĝo* de Oscar Wilde.



▲ 1

▼ 10



▲ 4

▼ 12

ing the worst President in the history of the / far, Crooked Joe Biden!!! For the good of o tion, and in order to inform the American pe in our Country, we must immediately have etween Crooked Joe and Honest Don. I'm re E, ANY PLACE!

iths **6.33k** Likes

Mar 11, 2



Harmonio kiu savos la mondon

Nicola Ruggiero

recenzas *Unu Animo Homa*

1. Enkonduke

Antaŭ mi staras la duvoluma verko *Unu animo homa*, poezia plenverkaro de Marjorie Boulton. Ĉe la frontpaĝo de la unua volumo ŝia mieno estas serioza, ŝia rigardo ŝajnas celi min leganton. Ankaŭ ĉe la dua volumo ŝi simile rigardas, sed ŝia mieno estas ridetema, kvazaŭ rikana, kvazaŭ ŝi implicate volas aserti, ke estas konsentosigno inter ŝi, la verkisto, kaj mi, la leganto.

Antaŭ mi staras monumento: mi sinceramas, se mi konfesas, ke nur post longa tempo mi kuraĝis krajonmarki versojn aŭ notojn sur tiuj ĉi paĝoj. Ankoraŭ plu konfese: dum longega tempo, mi gapis kaj miris pri mia ŝtipkapula nekompreneo pri multaj, aŭ tutaj, tropoj kaj stilfiguroj. Kio obstaklis min? Tiu ĉi demando restos kaj mi provos solvi la enigmon iom post iom.

Kiel legi?

Povas ŝajni banala demando kiel legi tian verkon. Ja ne temas pri romano, aŭ novelaro, tiel, ke eblas legi de kovrilo al kovrilo sen iam ajn superi aŭ tutsalti paĝojn por antaŭeniri. Versoj estas io aparta. Se oni volas iom kompreni la evoluon de la poezia verkado, indas certe legi ekde la komenco kaj iom post iom, malrapide kaj dece atente, proksime rigardi la versojn kaj rekrei mense kaj anime tion, kion la vortoj diktas. Tamen, eblas ankaŭ per la fingro

En 2022 EAB eldonis la plenan poezian verkaron de **Marjorie Boulton**, duvolumaĵon redaktitan de **Edmund Grimley Evans**.

Nicola Ruggiero akceptis la timigan defion recenzi ĝin.

sekvi ian inspiron laŭ la indekso: fine, la titoloj montros ian vojon. Mi mem legis ĉiun poemon laŭ la ordo donita: nepris en mi la deziro kompreni la evoluon de la poetiko de Boulton, ekrimmarki, noti, gapi kaj miri, vojaĝi laŭ la jardekoj. Eĉ tra fantaziaj spactempaj kondiĉoj: en tiuj ĉi du volumoj aperas finfine du poemaroj pri kies ekzisto oni pli-malpli sciis, sed unu estis aperigita sen ŝia aprobo, la alia devis resti kaŝita. Pri tio poste.

Ofte oni trovos ĉagrenon, melankolion kaj malgajon en ŝiaj versoj. La poetino bezonas malkaŝi kaj espliciti siajn emociojn, eĉ kiam ili estas tre ekstremaj kaj ripetigas. Tamen, ankaŭ veras, ke ŝi pri-versis pri gajigaj aferoj: elstara ekzemplo estas la kolekto *Cent ĝojkantoj*, sed ankaŭ en *Duel'* ŝiaj poemoj estas – almenaŭ laŭ-ŝajne – leĝeraj.

Pri la poetino

Marjorie Boulton estas tri...

*Mi estas tri. La digna lektorino
kun la krajon' kritika libron legas.
En nigra robo, pri la origino
de l' dramo primitiva ŝi prelegas.*

*Dume, en koro, primitiva dramo
okazas, ĉiam freŝa kaj terura;
sub nigra robo brulas nun pro amo
virino simpla en dezir' tortura.*

*La lektorino pensas. La virino
baraktas, krias, nur angoron sentas.
Sed la Poet', per arta disciplino,
observas ilin ambaŭ, kaj komentas.*

Tion ŝi mem diras en tre konata poemo kiu en simpla estas ŝlosila pri ŝia simbolaro kaj poetiko. En tiu ĉi mia recenzo mi provos paroli pri ŝi kaj ŝia poetiko nur per la versoj kaj ŝiaj vortoj. Mi profitas ĝuste de tio, ke mi apenaŭ konas ŝian personan vivon kaj vidis ŝin nur en la UK en Lille. En tiu ĉi jaro, ŝi festus sian 100-jaran datrevenon kaj tiel decas rememori veran poeton: kiel nemortalon kiu naskiĝas kaj neniam mortas.

Fenestro al la mondo

Baldur Ragnarsson, en sia omaĝa parolado por Marjorie Boulton, parolas pri ŝia unua poemaro kiel fenestro al la mondo, kaj en sia prelegaro *La poezia arto* mencias la virinecon en ŝia verkmaniero. Estas certe, ke ambaŭ tiuj sentaj dimensioj (la fenestreco kaj la virineco) neniel celas etigi la poetinan grandon, sed volas provi klarigon pri la etapoj aŭ formiĝo de ŝia poetiko. Kaj tamen, se ŝia poetiko kiel «fenestro al la mondo», krom esti rekta citado el *Kontralte* (183–206) estas sendube klara, efika kaj senpera, mi mem ne povas diri la samon pri tiu virineco. Pri kio temas? Mi provos klarigi tion laŭlonge de mia recenzo.

2. Enhave

Unu animo homa aperas en du volumoj, binditaj, kun dura nigra kovrilo. La formato estas la sama kiel por la poeziaj plenverkaroj de Auld kaj Ragnarsson, kaj tio estas sendube feliĉa solvo: ĝi plu fosas la sulkon de tradicio ankoraŭ burĝona en Esperantujo, kaj espereble tio plu estos modelo por la futuraj eldonaĵoj.

Edmund Grimley Evans brile kaj filologie redaktis la tuton, tiel ke apenaŭ estas makuloj en la tekstoj. Grandan gratulon al li kaj al la Esperanto-Asocio de Britio pro la laborego kaj fajna rezulto!

Ŝia poezio nur supraj aperas simpla kaj malprofunda: la riĉo de la verboj kaj substantivoj montras la kompleksan sistemon de la mondo kiun nia poetino volas rekrei ĝuste per la vortoj. Al vira leganto ŝia vort-trezoro ŝajnas troa, precioza, kvazaŭ oni estus superŝutita de lavango da poeziaj bildoj densaj, konfuzaj, nurŝajne ĥaosaj. Oni bezonas aliajn lensojn por filtri la poetinan realon, kompreni ke estas pluraj tavoloj kaj niveloj. Estas tuta mondo en la animo poeta: ni scias, ni konscias, ke ŝi ja elektis manplenen da vortoj ĉu pro la sono, ĉu pro la semantika forto kaj ties ideaj kunligitaj interagoj, kaj tamen tio implicitas, kaŝas, aliajn regnojn, aliajn mondojn, kiujn eblas nur percepti.

Indas aserti banalaĵojn pri kiuj oni neniel silentu: kvankam Boulton uzas parte poetikan lingvaĵon de viraj poetoj, nome la parnasisman (t.e. fiksa metriko kaj rim-abundo), ŝi parte reinventas ĝin per apartaj rimedoj kiel diversaj strofoj aŭ alterno de rimoj kaj agordoj (speco de rimo, en kiu samsonas nur la konsonantaj elementoj) en sama poemo.

Alia ebla, verŝajna, banalaĵo estas la virineco kiu, laŭ Ragnarsson, klare troviĝas en la poemoj de Boulton. Temas pri ŝia estado, pri ŝia personeco. Longe laŭ preskaŭ ĉiu poemo troviĝas virina sperto laŭ virina vidpunkto: la tasko de la poetino ne estas disdoni pretajn solvojn al cerbumotaj problemoj, sed priskribi por koni. Se Adamo nomis la kreitaĵojn, Evo certe konis ilin.

Estas risko fali en oscedo, sed ankaŭ la tuta simbolaro iel rilata al naturaj elementoj, se rigardata laŭ vira aŭ virina vidpunkto, ŝajnas ekhavi tute alian signifon: ekzemple, la floroj ne havas nepre interrilton seksan aŭ literaturan, sed ilia nura signifo estas plej verŝajne ilia beleco, ilia gracio, kie la ŝlosila vorto en la difino pri gracio estas la harmonio, t.e. ĝusta aranĝo. Simile, la blua papilio, la morfo, iĝas fetiĉa besto: kvankam insekto, ĝi vekas fascinon, ĉarmon; ĝian ofte mal-longan vivon karakterizas mirinda serio da transformiĝoj.

La virina perspektivo

La virina perspektivo estas en ĉiu ŝia poemo. Eĉ pli evidenta ĝi iĝas en la kolektoj *Nuntempa eposo* kaj *La sekreta psiko*.

Nuntempa eposo

Nuntempa eposo estas longa poemo dividita en naŭ partoj, verkita en tercinoj kiel la *Dia Komedio* de Dante Alighieri. En ĝi la poetino priskribas parton de la vivo de Vlasta Mira Uršić: en tiama Jugoslavio, tuj post la dua mondmilito, la komunisma reĝimo suspektas ĉiun pri spionado, arestas, torturas por ricevi konfeson.

*Subite, ŝi sin kredis papilio
Fluganta elekteme tra la tera
Koloro kaj beleco, sur folio,*

*Sur floro, muro, sur la voj' aera,
Amema, mielebriema besto,
Ŝi kredis sin insekto – sed libera.*

Jen de libera menso la protesto! (261)

La heroino restas firma, malgraŭ la torturoj, ŝi ne cedemas al la perforto: kiam ŝi ricevas paperon kaj skribilon por doni konfeson, anstataŭe ŝi elverŝas la kreivon ĝis tiam nur kovatan en si mem. Mi invitas vin legi tiun ĉi kolekton: Boulton sukcesis rekrei la etoson de tiu tempo kaj reĝimo kaj la psikologion de la heroino montrante al ni legantoj ŝiajn pensojn, emociojn, sentojn. Ŝi elstare prezentas paradoksojn aŭ kontrastojn, kiuj reliefigas la profundon de la sentaj dimensioj:

*La voĉ senvoĉa en mallum' proklamis
Ĉielan veron tie, en infero. (273)*

Vintro leviĝis en printemp' aŭtuna (276)

La sekvantaj versoj aparte igis min pripensi:

Denove [ŝi] konis sin virino bela

En tiu ĉi poemo pli ol en aliaj, la poetino ne ripetas la subjektan pronomon se ĝi estas la sama de la antaŭa pensoĉeno. Ŝajnas preskaŭ ke la subjekto malaperas eĉ se ĝi estas tute antaŭ niaj okuloj, kaj ĝi

iel antaŭsignas la forvanuon de la heroina personeco kaŭzita de la tortura tempo. Ankoraŭ, la poetino neniel donas detalojn pri la beleco de tiu virino. En la mallumo de la malliberejo ne gravas tiaj detaloj: ne temas nur pri korpa beleco, sed pri anima, psika beleco, la harmonio kiu savos la mondon. Fine, la fakto, ke Boulton ne publikigis tiun ĉi eposon por ne endanĝerigi la veran heroinon, estas kortuŝa konkretiĝo de la plej homarana solidareco.

La sekreta psiko

Tiu ĉi sonetaro priskribas la mensan, fizikan kaj animan evoluon de knabino je virino kaj ties enamiĝo kaj ekamoro al viro. Kun *Sekretaj sonetoj* de Peter Peneter (t.e. Kálmán Kalocsay) ĝi kunspertas nur la poezian rimedon (soneto) kaj la ĝenron (erotiko): ankoraŭfoje, la poetino uzas elementojn de la vira poezia lingvaĵo por reinventi ĝin. Fakte, ŝiaj sonetoj estas dividitaj en du strofoj respektive okversaj kaj sesversaj: tio povas ŝajni balastaĵo, sed fine tio ege influas la sintakson kaj la pens-ordon en la limoj de severa rimado. Due, pri la erotiko: la virineco plene elstaras. Ŝi ŝajnas ekrakonti preskaŭ pri

pratipa peko kiam la poetino mencias la ekmenstruon de la rolantino. Rolantino, jes, ĉar finfine ni estas legantaj versojn kaj poezion: ĉio estas vera kaj ĉio estas fikcia, ĉio estas rekonstruita surbaze de ideaj kunligoj, spertoj individuaj kaj kolektivaj. Laŭ la notoj de Evans, ni ekscias, ke la poetino ekverkis tiun ĉi sonetaron en Zagrebo. Bedaŭrinde ni ne scias precize kio sparkis en ŝi, same bedaŭrinde ŝi ne publikigis ĝin: laŭ mi, ĝi estas unu el ŝiaj plej maturaj verkoj laŭ pluraj vidpunktoj. Poetike, la rimoj sonas pli senperaj, verŝajne pro la longetaj strofoj kiuj fakte estas vere taŭgaj por ŝia spiro kaj penso, pli ol la tercinoj de *Nuntempa eposo*. Psikologie, la poetino kapablas vidi la sekretan psikon de la individuo, kun ties komplikoj kaj kaŝejoj, kaj kapablas rekrei vort-post-vorte plenan virinon, plonĝe sentime en la profundo de la sentaj dimensioj. Politike, la virino fortas per siaj elektoj kaj kreas ne barilon, sed ideologian bazon en kiu la seksoj renkontiĝas por kritiki, batali kaj transformi: «ĉar ambaŭ seksoj serĉas la pardonon / inter fremdecoj – ĝis la korpoj jesas.» (17. *Malsimiloj*, p. 443). Aŭ ankoraŭ:



Unu animo homa
£20 ĉe EAB

«Ĉu vi permesas?» – «Jes.» – Ŝi treme pretas
denove post pretigoj stringaj, kisaj,
kuŝas surdorse kun femuroj disaj –
nenio nun en kaŝo pli sekretas;
la centro sin oferas, eĉ ĝi petas
aperte; kaj subite, sub penisaj
puŝpremoj dolĉaj, flamoj berberisaj
eksplodas kie nia par' duetas.

*Subite, eĉ sentumoj malaperas.
Ekzisto nuda, preterkorpa, veras;
ŝi ŝajnas flugi kaj ŝi ne vertiĝas.
Per pretersensa iluzio sensa
la lito kaj la ĉambro nun pleniĝas
per lumo ora, varma, lumo densa.*
(26. La tria fojo, p. 452)

Kiel bele maltabuaj estas 59 *Prudento* (p. 485) kaj 60 *Reciproko* (p. 486), manifestoj en soneta formo pri protekta seksumado, kie reciprokas unu la alian per amo kaj sincero en plena interrespekto. La sonetoj 70, 71 kaj 72 mencias temon kiu estos pli ofta en la postaj ondoj de la feminisma movado: Boulton uzas arkaikan vorton, saturitan de eŭfemismo: *tribadismo*, tradukita de PIV per *sapfismo*, t.e. virina samseksemo. Mia opinie, tiuj versoj tre verŝajne donas bonan bildon pri progresema menso en la 1950-aj jaroj; tamen nun post sepdek jaroj, ili aperas sufiĉe malaktualaj.

La sonetaro preskaŭ abrupte finiĝas per la lastaj kvar sonetoj en kiuj incidento haltigas la ravan itineron de la paro:

*La koro kantas dum la ŝtorm' tempestas
sur tiu ĉi soleca, ŝvela ondo.
Valida estis amo; kaj ŝi restas
inter la feliĉuloj de la mondo.*
(77. De profundis, p. 503)



3 Konklude

Ne eblis paroli pri ĉiu kolekto aŭ poemo. Jes ja, en tiel granda verko nepre enŝteligis malperloj, sed ankaŭ ili difinas la poetecon kaj la poetikon de Boulton. Tiu ĉi verko estas grandega paŝo por ni por plene konatiĝi kun kalejdoskopa poetino kies talento ni nur suprajne rekonas. Ĉiam indas relegi kelkajn ŝiajn versojn por kompreni kaj fine deklari, ke la Esperanta poezio ne plu estas afero nur de viroj: la poezio revivas per konstanta reinventado de la simbolaro kaj lingvaĵo.

Boulton estis tre produktiva literaturisto: ŝi verkis poemojn, prozaĵojn, eseojn kaj teatraĵojn. En ĉiu ŝia verko esprimiĝas la granda, ŝlosila temo kiu certe estis tre kara al ŝi: ŝi estis ĉampiono de la zamenhofa homaranismo. Krome, ŝia persona vidpunkto kaj do perspektivo estas unika en la verkista panoramo en Esperantujo.

Boulton plu instruas al ni, ke eblas verki komplike kaj samtempe simplavorte per sentaj dimensioj pri niaj plej profundaj emocioj, sentabue kaj poezie. ■

Nicola Ruggiero estas membro de la Akademio de Esperanto kaj estrarano de la Akademio Literatura de Esperanto.



Anagramoj — 996

Jen kelkaj anagramoj de vortoj uzataj en tiu ĉi numero de *LBE*. Solvu ilin uzante la indikan priskribon. La listo indikas la sinsekvon, laŭ kiu la vortoj aperas en la revuo. La eta cifero post la priskribo indikas la paĝon, en kiu la koncerna artikolo komenciĝas.

- | | | |
|-----------|--|------------------------|
| 1 | Vivo de dorlotkato. ⁶ | PANDEMIOJ DE BOSKSTEDO |
| 2 | Mezpunkto de ĉio. ⁶ | NEDECA KROMSTOLO |
| 3 | Inteligenta malbonulo. ⁶ | EL KARA PINFLORO |
| 4 | Parenco de laboristo. ¹⁸ | BIKINO DORMAS FOTILE |
| 5 | Ŝi parolas la portugalan. ³⁰ | MIA LIBANA KRIZO |
| 6 | Kiel Oksfordo, sed pli longe norden. ³⁰ | OGRO SEN LATKASKO |
| 7 | <i>Mi, vi, ili, ktp.</i> ³² | ALO POR NORMAJ PENSOJ |
| 8 | Ŝatata eta libro. ⁴⁰ | PLUA BELA MATĈO |
| 9 | Decido pri kiu plej bonas. ⁴⁰ | SKELETOJ EL TELUDO |
| 10 | Demandoj kaj respondoj. ⁴⁴ | LIVE MIA KAĜETKURZO |
| 11 | Oni rigardas tra vitro. ⁴⁸ | MARTELO DONAS FELON |
| 12 | En Balkanoj. ⁴⁸ | ZEBRA GENO |

Viajn solvojn sendu al tim.owen@esperanto.org.uk antaŭ la 1-a de oktobro.

Unu persono hazarde elektita el ĉiuj ĝuste respondintaj ricevos premieton.



Respondoj al *Anagramoj* — 994: **1** En fremdan vazon **2** Malgranda frato **3** Klasika muziko **4** Aroma Jalto **5** Ĉefredaktoro **6** Kontraŭbiblioteko **7** Lingvokapablo **8** Abomenindaj **9** Grandaj Anticipoj **10** Kometo en Muminvalo

Respondoj al *Anagramoj* — 995: **1** Ĉirkaŭmurigita **2** Abiturientino **3** Interlingvistiko **4** Hejmlaboraĵoj **5** Arkitekturo **6** Libroekspozicio **7** Finnrevena **8** Komunisma **9** Universitato **10** Butonpremio **11** Ŝipestro **12** Flugarmeo

Gratulon al Vilĉjo Walker (1994) kaj Richard Hall (1995)!

*I have discovered, as this day has gone along, that I have several points of contact with Marjorie Boulton, my fellow Somervillian. We both had family from Hull; we both read English, with the same syllabus including, clearly memorably, a reading of *Pearl*; we both taught, then returned to Oxford, and did post-graduate work; and we both loved cats. There the parallel stops, I'm afraid, as Marjorie was clearly more prolific and talented than I can aspire to. And influential far beyond an Oxford, or even a British, context. Her creativity is in a different league! I loved her verse – albeit the English version – and hadn't seen it before Tim sent it to me. It was a pleasure to read aloud and I would love to read more, though that ambition will be limited by my lack of Esperanto.*

Marjorie clearly had a passion for language, for peace and for friendship. She had a conviction that literature was about feeling, and a political conviction of common humanity. She was, indeed, a 'vera poeto' and certainly was 'unika'. Somerville is proud to have been part of her intellectual development and part of her life. She is part of her College's history. Now the challenge is to think about writing her biography...

Dr Jackie Watson

Alumni Relations Executive, Somerville College



